Eksterrete

pri komputilaĵoj kaj retaj projektoj



Volumo 2 - eldono 2020

Temo: bitlibroj, bitgazetoj kaj novaĵretejoj

AŬTORO KAJ ELDONISTO
Yves Nevelsteen
yves@nevelsteen.info

www.nevelsteen.info

Flandra Esperanto-Ligo
Lange Beeldekensstraat 169
2060 Antwerpen
+32 3 234 34 00
www.esperanto.be

VOLUMOJ
Eksterrete estas plurvoluma verko. Jen la enhavo de la ĝisnunaj planitaj volumoj:

1 Lerniloj kaj vortaroj
2 Bitlibroj, bitgazetoj kaj novaĵretejoj
3 Dissendolistoj kaj informaj retejoj
4 Aŭdovidaĵoj
5 Retaj projektoj
6 Teknikaj helpiloj

MALGARANTIO
Ĉi tiu verko ne celas esti kompleta. Ĝi nur reprezentas aktivajn kaj ĝisdatajn projektojn kiujn mi malkovris kaj taksas ne sufiĉe konataj kaj do diskonigindaj.

KONTRIBUU ANKAŬ VI
Ĉu laŭ vi mankas informoj en tiu ĉi volumo? Ĉu vi trovis eraron? Sciigu tion al mi. Per kunlaboro ni atingos pli.

Versio de 2020/05/22

© Ĉiuj rajtoj rezervitaj



Eksterrete estas projekto oficiale subtenata de UEA.

Enkonduko

Dum prelegserio pri komputilaĵoj kaj retaj projektoj en lokaj kluboj en Belgio mi rimarkis ke tre mankas superrigardo de indaj (kaj aktivaj) projektoj. Mi renkontis plurajn esperantoparolantojn kiuj ne konis gravajn projektojn kiel Libera Folio aŭ Beletra Almanako, ne scias kiel tajpi ĉapelitajn literojn per saĝtelefono, ne uzas bitlibrojn, ĉar tro komplikus... Post mia prezento mi foje per retpoŝto sendis la plej interesajn ligilojn al ĉeestintoj, sed tio klare ne sufiĉas. Papera verko kun tekstaj klarigoj daŭre plej taŭgas por tiu celo.

Por ke vi povu pli facile aliri la diversajn menciitajn ligilojn, la plimulton de la retejaj adresoj mi mallongigis per la servo *www.mallonge.net.* Por plifaciligi la aliron al la diversaj retejoj per mobilaj aparatoj, mi ĉie aldonis rapidrespondan kodon (*QR code*). Por krei la diversajn kodojn mi uzis la retejon *www.qrcode-monkey.com*

Samkiel la reta mondo, tiu ĉi verko estas en konstanta evoluo. Tial mi regule ĝin ĝisdatigos kaj planas (iam) unufoje jare presigi ĉiujn volumojn ankaŭ kiel jarlibron.

Mi foje aldonis ankaŭ informojn pri kial iu libro aŭ gazeto (ankoraŭ) ne aperas en bitformo.

Mi celas per tiu ĉi verko ne nur informi esperantistojn, sed ankaŭ danki aktivulojn pro ilia mirinda laboro kaj instigi ilin daŭrigi la eldonadon de libroj kaj gazetoj. Do:

DANKON PRO VIA LABORO - BONAN DAŬRIGON!

Ĝuu la esploradon!

Yves

LiberaPay

La fonduso Instigo-Liberapay, sub la aŭspicio de UEA, subtenas Esperanto-agadojn, kiuj celas provizi retajn servojn en Esperanto. Kiel komisiito de UEA pri reta agado, mi gvidas la laborojn.

Mi invitas vin subteni la kreadon, eldonadon kaj disvastigon de Eksterrete-libretoj per donaco al Instigo-Liberapay.

https://eo.liberapay.com/instigo

PDF: alklaku kaj eklegu!

Bitversio de Esperanto-gazetoj kaj -libroj estas nuntempe proponata de pluraj eldonejoj. Multe kreskis la sendokostoj dum lastaj jaroj; krom aĉetado dum renkontiĝoj, ne vere ekzistas pagebla solvo por tiu problemo. Prave oni alkutimiĝu al legado sur ekrano, sed problemo tio ne nepre estu! Bitlibroj estas (kutime) plenkoloraj, la kvanto de paĝoj malpli gravas, ofte ili senpagas kaj eblas ilin traserĉi. Mi opinias, ke ni ĉirkaŭbrakumu la avantaĝojn de ĉi tiu fascina teĥnika evoluo por antaŭenigi la Esperantan kulturon.

Eĉ se vi estas ne tre sperta pri komputiloj, ne (plu) komplikas malfermi PDF-dosierojn. Kutime sufiĉas alklaki ligilon aŭ duoble alkaki elŝutitan dosieron.

Konservu kaj legu dosierojn sur ĉiuj viaj aparatoj

Estas tamen bona ideo iel konservi kaj strukturigi elŝutitajn librojn kaj gazetojn en via komputilo. Se vi volas, ke viaj diversaj dosieroj estu alireblaj de ie ajn, mi rekomendas ilin (aŭ kopion) konservi en la "nubo" [angle: in the Cloud]. Microsoft (Vindozo) rekomendas por tio OneDrive, Apple (Makintoŝo) rekomendas iCloud kaj Google faras ĉion por ke vi ekuzu Google Drive. Estas multaj eblaj solvoj kaj iom dependas de via prefero, kion uzi.

Post multe da esplorado kaj praktika elprovado, mi persone ekuzis **Dropbox**. Ĝi plaĉas al mi, ĉar eblas sur iPad aliri PDF-dokumentojn rekte el la aplikaĵo **Adobe Acrobat Reader**.

Poŝlegilo

Elektronika papero estas ekranteknologio fasonita por imiti la aspekton de ordinara inko je papero. Male al konvencia plata panelo-ekrano, kiu uzas kontraŭlumon por prilumi siajn pikselojn, elektronika papero reflektas lumon kiel ordinara papero kaj estas kapabla teni tekston kaj bildojn senfine sen uzi elektron, permesante al la bildo esti ŝanĝita poste.

Por konstrui elektronikan paperon, pluraj malsamaj teknologioj ekzistas. Ĝi ebligas pli komfortan legadon ol konvenciaj ekranoj pro la stabila bildo, kiu ne devas esti refreŝigata konstante, la pli larĝa spektado-angulo, kaj la fakto ke ĝi reflektas ĉirkaŭan lumon prefere ol elsendi propran lumon. E-paperekrano povas esti legata en rekta sunlumo sen ke la bildo malintensiĝas. La kontrasto-racio en haveblaj ekranoj ekde 2008 estas priskribita kiel simila al tiu de gazeto, kvankam lastatempe-evoluintaj efektivigoj estas iomete pli bonaj. Ekzistas daŭranta konkurado inter produktantoj disponigi plen-kolorokapablecon.

Elektronikan paperon oni ĉefe uzas en elektronikaj legiloj por legi bitlibrojn. **Amazon Kindle** estas ekzemplo de tia aparato. Edmund Grimley Evans pri tio skribis en la magazino Monato la jenon:

"Ankaŭ per iPad oni povas legi bitlibrojn. Por granda teknika PDF ĝi verŝajne estus multe pli bona legilo ol Kindlo. Sed por romano mi preferas Kindlon: pro la papersimila ekrano, pro la daŭro de la akumulatoro, kaj pro tio, ke oni povas tiel facile teni ĝin, eĉ per unu mano: eble pli facile ol paperan libron, ĉar Kindlo ne havas ĉarniron en la mezo."[1]

Por multaj esperantistoj verŝajne sufiĉos senpaga aplikaĵo Adobe Acrobat Reader por tabulkomputiloj kun iOS (Apple iPad) kaj Android (Samsung kaj aliaj).

1 *http://www.monato.net/2011/010280.php*

Kiun bitan formon elekti?



La gazeto Monato estas liverita en tri formoj: PDF, ePub kaj Mobipocket. Laŭ ĝia redakcia sekretario Paul Peeraerts, 72% ĝin legas en "granda" komputilo, 24% en poŝtelefono aŭ tabulkomputilo. Se vi planas rigardi la revuon en komputilo, do en tablokomputilo aŭ tabulkomputilo, tiam vi prefere elektu la dosierformon PDF. En la formo PDF la revuo aspektas tute same kiel en la presita versio.

Se tamen vi planas rigardi la revuon en malgranda ekrano, ekzemple en poŝtelefono aŭ en librolegilo (ekzemple en legilo de Kindle aŭ Sony), tiam indas testi ankaŭ la formojn ePub aŭ Mobipocket. Kial testi? Nu, ĉar ĉiu aparato donas iom alian rezulton. La ĉi-apuda bildo montras al vi aparaton de iPhone kun Monato en la formo PDF.



Vi konstatos, ke vi vidas la revuon en ĝia normala fasono, sed la literoj de la ĉefa teksto estas tre etaj. Vi povas grandigi ilin, sed tiam vi vidos nur parton de la tekstolinio. La posta bildo montras al vi aparaton de Samsung kun Monato en la formo PDF. En tiu ĉi aparato vi eĉ ne vidas la kompletajn liniojn. Ilia fino forfalas. Do tie vi devos konstante rulumi maldekstren kaj reen por povi legi la revuon.

Legado en la formoj ePub aŭ Mobipocket solvos tiun problemon. En tiuj formoj la linioj adaptas sin al la larĝo de via ekrano.


ekonomiajn reformojn, kiuj plie limigos niajn liberojn kaj interhelpajn komunumojn), aŭ ĉu ni sukcesos ekkrei pli solidarajn kaj kunlaboremajn rilatojn inter la homoj kaj inter la landoj. En tiu dua okazo, se temas pri solidareco kaj kunlaboremo, eble nia kara lingvo kaj ties valoroj ankoraŭ havas ion por diri.

Fina demando: ĉu do ePub kaj Mobipocket? Nu, provu unue ePub. La plej multaj legiloj kaj poŝtelefonoj povas trakti ĝin. Tamen iuj aparatoj, ekzemple iuj de Kindle postulas Mobipocket.

Simple testu per alklako de la subaj ligiloj, kaj vi vidos!

- Dosierformo PDF precipe por grandaj ekranoj
- Dosierformo ePub precipe por poŝtelefonoj kaj libro-legiloj
- Dosierformo Mobipocket precipe por librolegiloj de la firmao Kindle

Pliaj bildoj aperas en la retejo www.monato.be/pdf/monbite.php

Studaĵo pri bitlibroj

Sergio Pokrovskij en 2015 faris ampleksan studon pri bitlibroj. Pri tio vi povas legi lian studaĵon *Bitlibra revolucio*. *www.tinyurl.com/bitlibroj-studo*

En sia studo, s-ro Pokrovskij prave atentigas pri tio, ke per si mem bitlibro ne estas io elektronika; elektronika estas aparato uzata por ĝin legi: komputilo, poŝtelefono aŭ speciala elektronika bitlibrolegilo [angle e-reader].


Bitlibroj pagendaj

Nur tre malrapide libroj (kaj gazetoj) en Esperanto ekaperas ankaŭ ciferece. Unu el la ĉefaj kialoj sendube estas la komplikeco de kopirajto-protektado. Tre facilas plusendi PDF-dosieron al amiko... Laŭ miaj esploroj nuntempe teknologie bona solvo por protekti kopirajtitajn librojn en Esperanto estas Google Play, uzata en Esperantujo nur de eldonejo Mondial (vidu ĉi-sube). Ekzistas Google Play-programaro por Android kaj iOS. Aliaj grandaj firmaoj kiel Amazon (Kindle) bedaŭrinde ankoraŭ ne ebligas publikigi librojn en Esperanto.

Bitlibroj de Mondial *www.bitlibroj.com*

Mondial estas unu el la gvidaj eldonejoj de literaturo en Esperanto. Bitlibroj estas ĉe ili akireblaj en ePub-formo kaj en PDF-formo. Iliaj Esperanto-libroj estas plej diverstemaj:

- originala Esperanto-literaturo (originala prozo, originala poezio)
- literaturo tradukita al Esperanto
- faka literaturo originala kaj tradukita







Bitlibroj de Eldonejo Sezonoj *www.mallonge.net/sezonoj*

En februaro 2010 *Eldonejo Sezonoj* komencis kompili kaj enretigi bitlibrojn. Nuntempe ili disponigas 15 senpagajn bitlibrojn kaj du aĉeteblajn bitlibrojn (elŝuteblaj por konatiĝo kiel provlibroj) laŭ la popularaj normoj PDF kaj ePub.

Bitlibroj de Eldonejo Libera *www.eldonejolibera.be*

Eldonejo Libera de Lode Van de Velde eldonas profesie presitajn librojn malaltkvante. Ĉiu ajn povas do eldoni sian libron kaj ricevi justajn tantiemojn. Eldonejo Libera estas la unua tia eldonejo en Esperantujo. Ĝi uzas la servojn de Lulu.com por disponigi siajn verkojn en la tuta mondo per laŭmenda presado.

Kelkaj libroj de Eldonejo Libera estas jam haveblaj kiel bitlibro en la retejo de Lulu.com. Pluraj aliaj aldoniĝos baldaŭ, ankaŭ en ePub.







La retbutiko de FEL *www.retbutiko.net*

La plimulto de la bitlibroj de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) estas liveritaj en tri diversaj formoj: ePub, Mobipocket kaj PDF (legebla per la plimulto de la poŝlegiloj kaj per ordinara komputilo).

La Retbutiko estas multe pli ol nura butiko. Ĉu vi sciis, ke ĝi enhavas pli ol 3000 librorecenzojn, kiujn vi povas facile konsulti? Ĝi ekzemple proponas 11 recenzojn pri la verko *Historio de la Esperanta literaturo*.

Se vi ĝis nun neniam mendis bitlibron en Esperanto, tre indas unue elŝuti kelkajn testlibrojn. FEL tial disponigas al vi plurajn provlibrojn, kiujn vi povas senpage ricevi, ĉu por testi, kiun libroformon vi preferas (ePub, Mobi aŭ PDF), ĉu por „iom trafoliumi" la librojn, kaj legi parton antaŭ ol mendi la plenan libron.

www.mallonge.net/provlibroj







DVD: la beletra revuo Fonto *www.mallonge.net/fonto-eo*

Dum 26 jaroj la monata literatura revuo Fonto regalis siajn legantojn per literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj. Aperis en ĝi preskaŭ mil noveloj, pli ol du mil poemoj kaj multaj teatraĵoj kaj eseoj. Krom beletraĵoj aperis ankaŭ jen kaj jen recenzoj kaj aliaj artikoloj, rilataj al literaturo. Tiuj 26 jarkolektoj konsistigas do tre riĉan kaj diversskolan fonton de beletro. La eldonanto de la revuo, la samnoma eldonejo Fonto, en 2010 aperigis, en kunlaboro kun Esperanto-Asocio de Britio, komputilan DVD-diskon, kiu enhavas la tutan kolekton de la revuo Fonto (1980-2006) kiel JPEG-dosierojn: 312 numeroj, 11 812 paĝoj. Aro da HTML-dosieroj, legeblaj per iu ajn TTT-legilo, faciligas la aliron al la paĝobildoj. Estas aldonita ankaŭ alternativa prezento kiel PDF-dosieroj, kiuj eble taŭgas por iuj poślegiloj. La tekstoj estas perfekte skanitaj kaj bone legeblaj. La sola malavantaĝo de la disko: ne eblas serĉi difinitajn tekstojn aŭ vortojn ene de la revuoj. La PDF-dosieroj ja estas bildaj sed ne tekstaj.[2]

Fonto-n iel anstataŭis Beletra Almanako kiu estas lanĉita en aŭtuno 2007.[3]

Bitlibroj kaj bitgazetoj senpagaj

Verkoj *www.verkoj.com*

Multaj verkistoj kontribuis kaj konstante kontribuas al la Esperanta kulturo. Ili ne agas pro ekonomiaj konsideroj, sed male: kreado en Esperanto postulas, ke ili investu multe da tempo kaj rimedoj, kelkfoje eĉ fronte al indiferenta kaj nekomprenema ĉirkaŭaĵo. Ili agas nur pro la amo al la literaturo kaj al la lingvo, kaj sentas, ke ili plenumas gravegan taskon. Oni povas konsideri ilin naivuloj kaj nerealaj homoj, sed dum la tempopaso ili donacis al Esperanto veran, neatenditan trezoron – originalajn kaj riĉajn literaturon kaj poezion, kiuj havas memstaran valoron per si mem en la monda kulturo. La retejo *Verkoj* estas dediĉita al ili. Ĝia celo estas igi iliajn verkojn alireblaj al la vasta publiko.

Ĉiu paĝo de tiu ĉi retejo enhavas tuj-tradukilon! Simple elektu kaj kopiu vorton (per *ctrl+c*, ekzemple), kaj la traduko tuj aperos. Ĉiam aperas Esperanta difino, kune kun traduko al nacia lingvo. *www.verkoj.com/tradukilo*

Projekto Gutenberg *www.mallonge.net/gutenbergo*

Projekto Gutenberg estas volontula laboro, kies celo estas enkomputiligi, konservi kaj disvastigi kulturo gravajn verkojn. La projekto komenciĝis en 1971, kaj estas la plej malnova bit-biblioteko. La plejmulto el ĝiaj verkoj estas kompletaj tekstoj de nekopirajtitaj libroj.

La projekto strebas al tekstkonservado, laŭeble libera kaj senpaga, en longdaŭraj kaj laŭnormaj formoj, kiuj estas uzeblaj en preskaŭ ĉiu komputilo. Tial laŭeble, ĉiuj tekstoj haveblas precipe nurtekst-formate. Multaj tamen havebas ankaŭ en formoj HTML kaj ePUB. Vi povas de la retejo elŝuti pli ol 50 librojn en Esperanto.

2 *https://esperanto.be/fel/mon/rec/fondvd.php*
3 *https://eo.wikipedia.org/wiki/Beletra_Almanako*

PDF-a librejo en Facebook *www.facebook.com/groups/librejo*

Pli ol 400 PDF-librojn vi povas libere elŝuti de la PDF-a librejo en Facebook. Eblas komenti la librojn legatajn kaj legitajn. Senkopirajtajn librojn vi povas tie mem ankaŭ alŝuti. Krom libroj troviĝas en la librejo ankaŭ multe da revuoj kaj lernmaterialoj. En julio 2018 tiu ĉi grupo havis preskaŭ 2 700 membrojn.

eLibrejo *www.mallonge.net/elibrejo*

Interreta biblioteko de 277 esperantlingvaj bitlibroj en PDF-formo. La bibliotekon prizorgis Franko Luin, kiu mortis en 2005. La librojn oni povas elŝuti al komputilo, malpaki kaj legi sur ekrano aŭ sendi al bitlegilo. La funkcio de presado estas nuligita, por ke neniu povu presi la librojn (tiel estas protektataj la aŭtoraj rajtoj de la verkintoj kaj tradukintoj). Aliflanke la PDF-formo ebligis doni al ĉiu verko aspekton de vera libro, aranĝita grafike, ofte kun ilustraĵoj. Ĉiuj libroj havas similan aspekton, ĉiuj havas bluan inkomakulon kiel simbolon de la eldonserio.

E-librejo de STUDIO *https://elibrejo.weebly.com*

Kvankam la PDF-formo ne ĉiam estas ideala por malgrandaj legiloj, la plejmulto da ili estas horizontale legeblaj per Kindle-5 aŭ pli novaj modeloj. Ankaŭ bone funkcias sur iPad kun la Kindle-aplikaĵo. STUDIO proponas facile (kaj senpage) elŝuteblan dosieron kun 250 PDF-libroj. Ekzistas ankaŭ katalogo en la E-librejo de STUDIO.

La Esperanta Librejo *www.mallonge.net/Jerzy*

Senpagaj libroj enretigitaj de Jerzy Wałaszek.

Brazila Spiritisma Federacio *www.mallonge.net/spiritismo*

Brazila Spiritisma Federacio (BSF) estas civila, religia, kultura kaj filantropa organizo kies celo estas i.a. kunigi la brazilajn spiritistajn societojn. Spiritismaj libroj estas senpage elŝuteblaj de la retejo de Brazila Spiritisma Federacio.

Eldonejo Mistera Sturno *www.esperanto.us*

Jen projekto por traduki majstrajn verkojn de scienca fikcio, fantasto kaj hororo. La bitlibroj distribuiĝas tute senpage kun permeso aĉetita de la kopirajtuloj. Laŭ la retejo "*Tiel elektas ili redoni al la movado*".

Budhana Ligo Esperantista *www.budhana.org*



Jen senpagaj, libere elŝuteblaj bitlibroj pri budhismo en Esperanto: pri la vivo de la Budho, sanktaj tekstoj, artikoloj & instruoj pri praktiko.

Disponeblaj en ePub, MOBI & MP3.

Esperanto Elektronike *dvd.ikso.net*



Esperanto Elektronike estas DVD-disko eldonita fare de E@I somere de 2006 kaj trifoje reeldonita (2006, 2011, 2012). Ĝia celo estas informi pri Esperanto (informado), ebligi al la interesiĝantoj lerni ĝin (instruado) kaj prezenti erojn de la Esperanta kulturo (utiligado).

La DVD estas la plej granda esperantaĵo laŭ la amplekso de sia enhavo (8 GB), kaj samtempe ankaŭ la plej granda eldonaĵo de sia tempo (sume aperis 21 000 ekzempleroj). La enhavo de la DVD estas havebla en la retejo de la projekto. Tie vi trovos grandan kolekton de libroj kaj revuoj.

Privata kolekto de An Olijslagers http://olijslagers.info/Esperanto/libroj.php

En la retejo De An Olijslagers estas pli ol 1150 senpagaj bitlibroj. Simple alklaku la numeron kaj mendu per retmesaĝo la koncernan bitlibron.

Bitotekoj: bitigitaj malnovaj libroj kaj gazetoj

BitArkivo.org

NI PRIZORGAS LA ESPERANTAN KULTURON

Bitarkivo *www.bitarkivo.org*

BitArkivo estas kunlaborema komunumo kiu volas gardi la Esperantan kulturon por ĉiam. Ili skanas librojn kaj revuojn (aprilo 2020: 78), indeksas la gazetnumerojn (aprilo 2020: 7190), arkivas podkastojn kaj gardas la dokumentojn ĉe ĉiamestaraj serviloj.

Bitoteko de la Hispana Esperanto-Federacio
www.bitoteko.esperanto.es

La Hispana Esperanto-Federacio komencis en 2009 ampleksan projekton, kies celo estas konservi la komunan kulturan heredaĵon de la esperantistoj. Por tiu celo oni kreis "bitotekon", kiu unue estis deponejo por dokumentoj de la Biblioteko Juan Régulo kaj eldonaĵoj de aliaj iberiaj bibliotekoj, kaj poste ekestis deponejo por la tuta esperantistaro.

Kunordiganto de la projekto estas bibliotekisto Ana Manero.[4] La bitoteko estas apogata de la Hispana Ministerio pri Kulturo kaj aliĝis al la eŭropa bitiga projekto Europeana. Tial ĉiuj verkoj estas disponigitaj laŭ Creative commons Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita (CC BY-SA 3.0). Aperas multaj bitgazetoj en la hispana bitoteko, sed bedaŭrinde la kolektoj ne estas tre kompletaj.

Fondaĵo Cesar Vanbiervliet *www.mallonge.net/vanbiervliet*

Unu el la plej grandaj Esperanto-kolektoj en la mondo troviĝas en la urba biblioteko de Kortrijk (Belgio). Roland Rotsaert kunordigas la bitigon de diversaj materialoj.

Kelkaj kolektoj de malnovaj gazetoj estas tre interesaj, ekzemple tiuj de Flandra Esperantisto, Belga Katoliko, Internacia Socia Revuo, Norda Gazeto kaj Sur Posteno.

Kolekto por planlingvoj *www.mallonge.net/vieno*

La Kolekto por Planlingvoj en Vieno (Aŭstrio) estas mondskale la plej ampleksa fakbiblioteko por interlingvistiko kaj dokumentas ĉirkaŭ 500 planlingvojn – inter ili krom Esperanto, kiu estas hodiaŭ la plej grava planlingvo, ankaŭ Volapük, Ido, Interlingua

4 http://www.liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/2011/madrida-bitoteko-proponas-retbibliotekan-kunlaboron/

kaj multajn aliajn. En la legosalono de la Kolekto multspecon de planlingvaj libroj kaj revuoj, multfacetajn arkivaĵojn same kiel plej diversajn sonregistradojn kaj filmojn. La Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko pasintjare havis pli ol 20 000 vizitantojn.[5]

Skanitaj malnovaj verkoj estas jam hodiaŭ libere disponeblaj en la retejo de la Kolekto; estas konkretaj planoj por re-skani la tutan kolekton per optika signorekona programaro (OCR) por traserĉebligi la tuton. La muzeo atente zorgas pri kopirajtoj. Ili nur disponigas per sia retejo liberaj verkoj, tio signifas, ke la aŭtoro liberigis ĝin al publika uzo, la aŭtoro mortis antaŭ pli ol 70 jaroj aŭ la dosieron ne eblas ŝirmi per la aŭtorrajto (ekz. ŝtata simbolo, matematika signo ks.).

900 planlingvaj libroj

Foliumu en planlingvaj publicaĵoj el la periodo 1868 ĝis 1913 kaj rigardu la unuan Esperanto-lernolibron "Internacia Lingvo" aŭ en unu el multaj libroj el la planlingva movado. La listo de diĝitaj libroj daŭre pliampleksiĝas kaj aktualiĝas.

Pli ol 70 planlingvaj revuoj kaj jarlibroj; pli ol 700 jarkolektoj

Foliumu en planlingvaj periodaĵoj el la periodo 1889 ĝis 1946 kaj rigardu la unuan Esperanto-revuon "La Esperantisto", la revuon de la Universala Esperanto-Asocio "Esperanto" aŭ la literaturan revuon "Literatura Mondo". La listo de bitigitaj periodaĵoj daŭre pliampleksiĝas kaj aktualiĝas.

Projekto Gutenberg *www.mallonge.net/gutenbergo*

Projekto Gutenberg estas volontula laboro, kies celo estas enkomputiligi, konservi kaj disvastigi kulture gravajn verkojn. La projekto komenciĝis en 1971, kaj estas la plej malnova cifereca biblioteko. La plejmulto el ĝiaj verkoj estas kompletaj tekstoj de nekopirajtitaj libroj. La projekto strebas al tekstkonservado, laŭeble libera kaj senpaga, en longdaŭraj kaj laŭnormaj formatoj, kiuj estas uzeblaj en preskaŭ ĉiu komputilo.[6] Verkoj estas precipê disponeblaj en dosierformoj html, ePub kaj txt.

5 *https://www.liberafolio.org/2018/01/16/vizitrekordo-ce-la-esperanto-muzeo-en-vieno/*
6 *https://eo.wikipedia.org/wiki/Project_Gutenberg*

Komencantoj: rekomenditaj aŭtoroj kaj verkoj

La teorio Nakamura *www.lernu.net*

En la retejo de Lernu.net Provu la rakonton **La teorio Nakamura**, kiu samtempe estas lingvokurso. En la biblioteko de Lernu.net vi trovos plurajn aliajn tekstojn kiuj taŭgas por komencantoj.

Claude Piron *http://claudepiron.free.fr*

Gerda Malaperis estas romaneto, lernolibro kiu uzas bazan gramatikon kaj estas aranĝita tiamaniere, ke ĉiu ĉapitro kompreneblas pli facile ol la posta; ĝi laŭgrade kondukas al sperta esperanto; fine, vortlistoj ekzistas por kelkaj lingvoj, do komencantoj facile sekvas la lecionojn. **Vere aŭ fantazie** estas esperantlingva legolibro, verkita de Claude Piron, taŭga kaj por plua lernado de la lingvo post komenca stadio kaj por "normalaj" legantoj regantaj la lingvon. Temas pri rakontoj el diversaj partoj de la mondo, aranĝitaj por laŭgrade vastigi la vortprovizon.

Emond Privat *www.mallonge.net/karlo-gutenberg*

Karlo estas facila legolibro por komencantoj unue eldonita en 1909. Ĝi estas unu el la Esperanto-libroj kun la plej multaj eldonoj; la lasta re-eldono datas de 2017.

Facila vento *www.facila.org*

Facila Vento liveras senpage al komencantoj facilajn tekstojn adaptitajn de aliaj fontoj. En Facila Vento oni uzas la listojn *facilajn* kaj *tre facilajn* kreitajn de Anna Löwenstein por la revuo Kontakto.

Esperanta Retradio *http://esperantaretradio.blogspot.com*

Kvankam la retejo nomiĝas "Retradio", tiun ĉi retejon mi rekomendas, ĉar en ĝi ĉiutage estas publikigita mallonga rakonto, kiun iu laŭtlegas. Tio multe helpas por pli bone kompreni ĝin.

Juna Amiko *www.eventoj.hu/juna-amiko*

Jen revuo por komencintoj kaj lernantoj de la internacia lingvo. Ĝi provizas variajn, mallongajn legaĵojn en simpla, aŭ almenaŭ ne tro komplika lingvaĵo. Do, ĝi celas precipe tiujn kiuj jam konas la fundamenton de Esperanto, scias la bazajn gramatikajn regulojn, sed ne trovas aliloke komforte legeblajn tekston. Sen vort-klarigoj la revuo uzas nur 1500 vortojn, la plej oftajn, kompreneble. Por faciligi la komprenon, ĝi foje uzas divid-strekojn (-) ĉe kunmetitaj vortoj.

Progresantoj: rekomenditaj aŭtoroj, verkoj kaj recenzoj

Baza legolisto de originala literaturo *www.mallonge.net/legolisto*

Tiu ĉi listo citas tiujn librojn, kiuj estas laŭ la opinio de William Auld legendaj aŭ almenaŭ legindaj. La liston William Auld kompilis en 1988 kaj ĝisdatigis en 1997.

Belartaj konkursoj *www.mallonge.net/bk*

La Belartaj Konkursoj de UEA havas la celon evoluigi la artojn en kaj pere de la internacia lingvo. Ili okazas ekde 1950 sub aŭspicio de UEA, la rezultoj estas proklamataj en la Universalaj Kongresoj de Esperanto. La Belartaj Konkursoj enhavas la branĉojn poezio originala, prozo originala, eseo originala, teatraĵo originala kaj Infanlibro de la Jaro.

Pri la verkoj de la unuopaj konkursaj branĉoj juĝas po tri ĵuriano.[7] Ĉiujare Eldonejo Mondial eldonas la libron Belarta Rikolto, kiu enhavas la premiitajn tekstojn de la Belartaj Konkursoj, la raporton de la prezidanto de la Belartaj Konkursoj, kaj kroman materialon.

Originala Literaturo Esperanta *www.esperanto.net/literaturo*

En ĉi tiu retejo troviĝas listoj de aŭtoroj, originalaj romanoj, noveloj/rakontoj, dramoj kaj poemaroj verkitaj originale en Esperanto kaj aperintaj de 1898 ĝis nun, ligitaj al dokumentoj kun pliaj informoj pri aŭtoroj kaj verkoj, inkluzive mil sescent recenzojn. La tuto formas ampleksan kaj kreskantan datumbazon.

Retbutiko de Flandra Esperanto-Ligo *www.retbutiko.be*

La retbutiko enhavas pli ol 2000 librorecenzojn, kiujn vi povas facile kaj senpage konsulti. Legeblas en ĝi ekzemple 11 recenzoj pri Historio de la Esperanta literaturo kaj 12 pri La ŝtona urbo.

Esperanto-sumoo *www.esperanto-sumoo.pl*

Internacia Esperanto-Sumoo estas speco de legado-konkurso de Esperantaj libroj. Ĝin iniciatis s-ro HORI Jasuo el Japanio en septembro 2009. Komence li prove okazigis ĝin nur por japanoj, sed konstatinte, ke ĝi estas tre utila por ĉiuj esperantistoj, li okazigis ĝin internacie en marto 2010. Poste 6 fojojn ĉiujn jaron krom en marto 2011 pro la Japana Katastrofo. En septembro 2018 okazis la 54-a konkurso kaj la totala sumo de la partoprenintoj estas 8705. En la retejo de Esperanto-sumoo legeblas kelkcent recenzetoj de ordinaraj legantoj. Bedaŭrinde mankas indekso.

7 *https://eo.wikipedia.org/wiki/Belartaj_Konkursoj_de_UEA*

Esperanto-gazetoj tra la tuta mondo *www.mallonge.net/gazetoj*

En la serio de filmetoj "Esperanto-gazetoj tra la tuta mondo" prezentas Alex André revuojn, bultenojn, informilojn kaj periodaĵojn, kiujn li trovis en la Centra Oficejo de UEA dum sia volontulado en 2016. Alex André kreis filmetojn interalie pri delonge ekzistantaj gazetoj, pri internaciaj gazetoj pri diversaj temoj kaj donas superrigardon de gazetoj en la tuta mondo. La filmetoj estas libere spekteblaj en YouTube.


Bitgazetoj kaj novaĵretejoj internaciaj


Ateismo *www.mallonge.net/ateismo*

Ateismo estas la revuo de la Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo (ATEO). Ĝi aperas du fojojn jare kaj enhavas artikolojn, leterojn, diskutojn kaj ateismajn novaĵojn. Ĉiuj membroj de ATEO ricevas la revuon papere aŭ rete laŭdezire. Jarkotizo de ATEO kostas 10 EUR jare por A-landanoj kaj 8 eŭroj jare por B-landanoj. Malnovajn numerojn de la revuo Ateismo vi povas libere elŝuti de ĝia retejo.

Balkana Verda Stelo *www.mallonge.net/balkanio*

En 2017 aperis Kroniko de Balkanio, antologio de Balkana Verda Stelo. Per tiu ĉi antologio Johan Derks formale finas la plurjaran redaktadon de la revuo Balkana Verda Stelo. La revuo estis destinita por 11 landoj en sud-orienta Eŭropo. Balkana Verda Stelo aperis kvarfoje jare. La antologio Kroniko de Balkanio estas libere elŝutebla.





Beletra Almanako *www.beletraalmanako.com*

Beletra Almanako (BA) estas literatura revuo, lanĉita en aŭtuno 2007. BA aperas trifoje jare ekde 2009. Principe ĉiu numero ampleksas inter 120 kaj 180 paĝoj. La eldonanto estas Ulrich Becker de la eldonejo Mondial en Novjorko (Usono). Redaktas ĝin Probal Daŝgupto, István Ertl, Jesper Lykke Jacobsen kaj Suso Moinhos. BA enhavas diversajn rubrikojn, nome pri poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, intervjuoj, leteroj ktp, originale kaj traduke.


La almanakon oni povas aboni kiel kajeran revuon, aŭ mendi aŭ aĉeti kiel libron. Beletra Almanako aperas en normala mezgranda libroformato, kaj ĝi estas facile mendebla, pagebla kaj aĉetebla, aŭ recenzebla kiel ajna libro. BA troviĝas ankaŭ ĉe Amazon kaj per Google Play eblas aĉeti ĝin kiel bitlibron.

Dia Regno *www.mallonge.net/diaregno*

La revuo Dia Regno, ISSN 0167-9554, estas la oficiala organo de KELI, la Kristana Esperantista Ligo Internacia. Ĝi aperas, kun interrompoj, de 1908, nuntempe 6-foje jare. Redaktoro estas ekde 2005 Bengt Olof Åradsson.

En la retejo fonto.net aperas arkivo de la revuo ekde 2012. Aktualajn numerojn povas aliri nur membroj. Informoj pri abono de Dia Regno aŭ membriĝo ĉe KELI oni trovas ĉe **www.keli.chez.com** > Kotizoj 2020.





La plej frua pentrajo pri la krucumo kaj resurekto de Jesuo Kristo en ilustrita manuskripto, kiu transvivis ĝis niatempe. Troviĝas en la Evangelio de Rabula el la 6a jc.


Esperanta Ligilo *www.mallonge.net/eo-ligilo*

Oficiala organo de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). Dek numeroj dum jaro. **Fondita jam en 1904**. La nuna redaktorino estas Olena Poŝivana el Ukrainio. La gazeto aperas en brajlo! Hejma presilo por brajlo ekzistas (ekz. Everest Index), sed bitlibroj estas eldonataj nur porokaze en diversaj landoj.

Bitarkivo kun ĉiuj aperintaj versioj aperas en www.mallonge.net/libea
Por plifaciligi la legadon por vid-handikapitoj, ĝi nur estas teksta.

Eŭropa Bulteno *www.mallonge.net/ebulteno*

Eŭropa Bulteno estas bitgazeto de Eŭropa Esperanto-Unio. Ĝis marto 2004 Eŭropa Bulteno aperadis kiel aldonaĵo de la periodaĵo La Ondo de Esperanto. Tio tamen iĝis tro kosta por EEU, kaj la somera numero 2004 de Eŭropa Bulteno, (suplemento al la julia La Ondo de Esperanto) estas la lasta surpapera numero. La sekva, septembra numero estis publikigita nur rete. Momente ĝin redaktas Zlatko Tišljar. Teknikan redaktadon faras Raymond Gerard (2010 ĝis nun), antaŭe Vesna Obradoviĉ (2008-2010).



Esperanta ligilo
n-ro 4, aprilo 2020

Enhavtabelo

El la estraro
El Esperantujo. La UK en Montrealo prokrastita
Forta bezono por medicinistoj
Esperanto-movado meze de la pandemio
Ni rememoras (pri Irena Łowińska)
Nia rondo familia. La verko, kiu venkis en konkurso
Ni gratulas!
Nekutimaj kutimoj. Reflektado el la mezepoko
Literaturo: N. Osipenko. Kiu ekkredos?
Stenografia pagxo (nur en brajla versio).

El la estraro

Estimataj kaj karaj geamikoj!

La estraro de LIBE cxiumonate skajpe kunvenas por trakti aktualajn aferojn kaj provi progresigi nian Movadon. Dum la pasintajmonatoj ni sekvis preparojn de la 85-a IKBE. Anatolij Masenko kaj Vjacxeslav Suslov, membroj de la Organiza komitato, regule informis nin pri la situacio. Gxis la fino de marto al la Kongreso aligxis pli ol 60 gepartoprenontoj. La preparoj bone progresis.

Bedauxrinde, la mondon trafis malsano terura (Covid 19) kiu malfaciligis cxiutagan funkciadon kaj malebligis okazigon de pluraj internaciaj eventoj. Dum la lasta skajpkunveno de la estraro, ni serioze pritraktis la situacion kaj decidis, ke ni prokrastu okazigon de la Kongreso. Cxu gxi okazos alidate cxi-jare aux sekvantjare dependos de evoluo de la situacio. Finan decidon pri tio ni faros fine de majo. Ni esperu, ke la malsano baldaux estos venkita, ke estos haltigitaj suferoj de la homaro kaj ke ni dauxrigos sengxene laboron por bono de niaj membroj!

Eartu bone, estu fortA LKA I GARDI LVIN!



Eŭropa Bulteno — Marto, No 201

Eŭropa Bulteno

Marto 2020, Numero 201

ALVOKO AL EŬROPA KAJ TUTTERA SOLIDARECO

En Eŭropo ni dum lastaj semajnoj stestas okazadojn kiuj ĝis nun ne ekzistis kaj starigas antaŭ nin komplete novajn defiojn. Dum la homoj malrapide konstruas novan restecon de sia ĉiutago, la ŝtatoj enkondukis klasikan manieron defendi sin kontraŭ klasikaj malamikoj – soldatoj sagaj landlimojn. Malgraŭ tio ke la viruso estas ĉio alia ol klasika malamiko, la landlimoj antaŭ nia okulo denove kreskis kun rapideco, pri kiu eĉ la plej ekstremaj naciistoj povis nur songi. Non kiam estas sendube la fakto ke por haltigi la viruson estas necese limigi la movigadon de homoj, ni devas ankoraŭ demandi nin kion tiu rezulto signifos por energeti? Nuntempe sendube neniuloke troviĝas vivoj kaj ekzistado de la homoj. Sed ni ne rajtas permesi ke ni ne starigu tuttempe ankaŭ demandojn ligitajn kun iom pri poste evoluto. Kia estos Slovenio kaj kia estos Eŭropo, kiam ni sukcesos venki la viruson?

Eŭropa Unio eliris el la krizo de la dua mondmilito kaj por siaj valoroj alprenis solidarecon kaj homajn rajtojn. Ĝuste tiuj valoroj estas dum tiuj ĉi tagoj en la plej granda danĝero ĝis nun.

Esperanto (revuo) *www.revuoesperanto.org*

Esperanto estas la ĉefa publikaĵo de la Esperanto-movado kaj la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi aperadas ekde 1905. Ĉefredaktoroj ekde aprilo 2017 estas Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova el Rusio.

Revuo Esperanto haveblas kiel PDF-dosiero kaj estas pagenda. Individua membreco de UEA inkluzivas la bitversion de revuo Esperanto. Eblas libere elŝuti ĉiujn jarkolektojn kaj numerojn de pli ol antaŭ unu jaro de la retejo www.uea.org/revuoj/esperanto. Malnovaj voĉlegitaj numeroj estas same libere aŭskulteblaj.

Esperanta Numismatiko *www.mallonge.net/numismatiko*

Organo de la Esperanto Numismatika Asocio (ENA), kies celo estas informi esperantistojn mondvaste pri Esperantaj medaloj, moneroj kaj diversaj aliaj pagiloj kaj numismatikaĵoj. ENA ne havas propran retejon, sed aperintajn gazetojn vi povas senpage elŝuti de la bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio. Vi povas ankaŭ senpage aboni la bitgazeton ĉe Bert Boon (bert.boon@skynet.be).





Esperantista Vegetarano *www.vegetarismo.info/arkivo-ev*

La periodaĵo de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) aperis unuafoje en 1914 sub la nomo Vegetarano. Nuntempe ĝi nomiĝas Esperantista Vegetarano kaj aperas unufoje jare. Ĝin redaktas kaj kompostas ekde la numero de 2007 József Németh. Kotizo 2018 por TEVA-aniĝo estas 21 EUR. Ĝi inkluzivas paperan version de Esperantista Vegetarano. Ne ekzistas aparta tarifo por la bitversio. TEVA disponigas bitversiojn de la bulteno Esperantista Vegetarano de la antaŭaj jaroj sia retejo kaj en la bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio.

Esperantologio / Esperanto studies *www.cb.uu.se/esperanto*

Internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilatantaj al Esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto, same kiel recenzojn. Paperaj ekzempleroj de la unuaj du kajeroj estas akireblaj de Universala Esperanto Asocio aŭ de la redaktoro. La elektronikan version publikigas Upsala Universitato sub la respondeco de Ingrid Maier.

Paperaj ekzempleroj de la tria ĝis sepa kajeroj estas vendataj de KAVA-PECH.

www.kava-pech.cz/esperanto






Espero Katolika *www.mallonge.net/espero-katolika*

Gazeto eldonata de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). Ĉar ĝi unue eldoniĝis en 1903 kaj plu estas eldonata, ĝi estas **la plej malnova daŭre aperanta Esperanto-gazeto**. Ĝia nuntempa redaktoro estas Carlo Sarandrea. Por disponigi vastan kaj valoran arkivon pri katolikismo kaj pri la katolika E-movado, IKUE celas enretigi ĉiujn jarkolektojn. Ili komencis en 2005 kaj ĝis hodiaŭ estas en la arkivejo legeblaj 227 numeroj. Ne ekzistas vendata biteldono. Plej frue kelkajn monatojn post la apero de la papera versio – sendata al abonintoj – IKUE senpage disponigas bitversion en sia paĝaro.

Etnismo *www.mallonge.net/etnismo*

Etnismo estas revuo, kiu informas pri etnaj aferoj. En ĝi troviĝas informoj pri ekzemple statoj de lingvoj minoritataj, tiklaj etnaj situacioj, teritoriaj reformoj ktp. Fine de la revuo estas informilo de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL). La unua numero de Etnismo aperis en 1972. Ekde 1999 ĝin redaktas Nicole Margot. Bitversio de Etnismo ankoraŭ ne ekzistas, sed ja estas libere havebla abunda kaj kreskigata arkivo de PDF-versioj. Pri tio al mi skribis István Ertl la jenon: *"Multo en Etnismo havas informan valoron jarojn, eĉ jardekojn poste. En 1986 mi legis probable ĉiujn ĝistiamajn numerojn, kaj tio multe klerigis min pri la etnisma temaro."* Abono al la papera versio estas principe ligita al membreco en IKEL. La jarkotizo de IKEL estas 20 EUR (normala membreco). Normale aperas 2 kajerojn jare de minimume 36 paĝoj.





Global Voices *https://eo.globalvoices.org*

Global Voices aŭ "Tutmondaj Voĉoj" estas internacia kaj multlingva komunumo de blogantoj, ĵurnalistoj, tradukistoj, akademianoj kaj aktivistoj pri homaj rajtoj. Kune, ili ekuzas la potencon de la interreto por konstrui interkompreniĝon trans limoj.


Global Voices jam depost 2005 okupas gvidan pozicion kiam temas pri raportado de civitanaj amaskomunikiloj. Ni kolektas, kontrolas kaj tradukas novaĵojn kaj rakontojn el blogoj, sendependaj komunikiloj kaj sociaj amaskomunikiloj en 167 landoj, rakontoj, kiujn vi ne povas facile trovi en la interreto.

Multaj el la plej interesaj kaj plej gravaj rakontoj en la mondo ne troveblas sur unu sola retejo. Kelkfoje ili disvastiĝas tra la interreto, tra malsamaj blogafiŝoj kaj pepoj (tweets) kaj en diversaj lingvoj. Tiuj ĉi estas la rakontoj, kiujn vi povas legi en Global Voices kaj kiujn ni tradukas en multaj lingvoj.

Laŭ The Economist, Global Voices estas la 4-a plej granda retejo en la mondo, post YouTube, Vikipedio kaj BBC, kiu kunigas civitanojn internacie.

Voluntulaj kontribuantoj estas la motoro kiu funkciigas Global Voices. Aldone al la verkado kaj tradukado de rakontoj, kontribuantoj provizas aron da lokaj scioj kaj ligas Global Voices al samideaj iniciatoj trans la mondo.

Aperas listo de Esperanto-tradukantoj en https://eo.globalvoices.org/authors



Informilo por Interlingvistoj *www.mallonge.net/informilo*

Publikaĵo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj Esperantic Studies Foundation (ESF), por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la novaĵoj en la kampo de interlingvistiko. La publikaĵo estas senpage havebla en PDF-formo en Esperanto kaj en la angla.


IpI 110 (1/2020) redaktis Simon Davies, kun helpo de Angela Tellier. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj.

Internacia Fervojisto *www.mallonge.net/fervojista*

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) estas kreita en 1948. La celo de IFEF estas disvastigi kaj apliki Esperanton en la fervojaj administracioj kaj en la fervojistaj medioj kaj rondoj.

IFEF eldonas la bultenon "Internacia Fervojisto", en kiu oni povas legi pri la aktivaĵoj de IFEF, fervojaj aktualaĵoj en la mondo, anoncoj de venontaj kongresoj, raportoj de pasintaj renkontiĝoj ktp. Redaktas ĝin Ladislav Kovář. Ĝi aperas ses fojojn jare en reta kaj papera versioj.

La reta arkivo de IFEF enhavas PDF-ekzemplerojn de la bulteno "Internacia Fervojisto" kolekto de 2014 ĝis 2018.



IpI

Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 110 (1/2020) ◆ 29-a jaro (tria serio) ◆ ISSN 1385-2191

Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)

www.esperantic.org www.facebook.com/esperantic @esperanticsf @esfacademic

ENHAVO

Bonvenon 3

Venontaj eventoj 4

Brita Lingvopolitiko Post Briteliro (UKLPAB) 4
Nitobe-Simpozio: Lingva diverseco kaj daŭripova evoluigo 5
Reta Esperanto-kurso por verkemuloj 6
Kurso por komencantoj ĉe la Universitato de Parizo 6
Esperanto por komencantoj ĉe la Universitato de Liverpolo, Anglio 6
Kurso de Esperanto en la Universitato UNED, Hispanio 6
Esperanto ĉe la Universitato Stanford, Kalifornio 6

Raportoj 7

Militrakonto ĉe konferenco en Talino 7
Interlingvistika sesio kun instruista trejnado 9
5-a Internacia Konferenco pri Aplika Lingvistiko 9
90-jara jubileo de la Esperanto-muzeo 10
Das Ende von Babel? 10
Parolado de François Lo Jacomo ĉe Unesko 10
Internacia konferenco en Perugia 10
Esperanto fariĝas protektita heredaĵo de Kroatio 11

Libroj 12

Davide Astori, *Due passi in Esperantujo – Promenadeto en Esperantujo* 12
Carlos Casares (trad. Suso Moinhos), *Vundita vento* 12



Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) kaj fervojfaika revuo

ISSN 1397-4270

2018.4

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn

Vroclava trafiko

Internacia Pedagogia Revuo *www.ilei.info/revuoj*

Trimonata revuo por Esperanto-instruistoj, eldonata de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Ĝia nuna ĉefredaktoro estas Jozefo Nemeth. La unua numero aperis en la jaro 1908! IPR prezentas instru-fakajn artikolojn, edukajn novaĵojn, recenzojn de lernolibroj kaj de alispecaj lerno-materialoj kaj organizajn informojn. IPR estas ankaŭ ligilo inter bazlernejoj, mezlernejoj, altlernejoj kaj universitatoj, kie Esperanto estas instruata.

Kun aliro nur al bitversio de IPR, membreco de ILEI kostas 10 EUR por A-landoj kaj 5 EUR por B-landoj.

Juna Amiko *www.ilei.info/revuoj*

Internacia Esperanta revuo por lernejanoj kaj komencantoj, eldonata de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) ekde 1972. Ĝi aperas ĉiujare kvarfoje. La nuna ĉefredaktoro estas Stano Marček. Ĝi provizas variajn, mallongajn legaĵojn en simpla, aŭ almenaŭ ne tro komplika lingvaĵo. Ĝi prezentas rakontetojn, artikolojn pri aktualaj temoj, poemojn, kantojn, kvizojn, ŝercojn, teatraĵetojn, raportojn pri Esperanto-aranĝoj, intervjuojn kaj multon pli.

Bitversio jare kostas A-lande 11 EUR kaj B-lande 7 EUR. En ĝia reta arkivejo estas elŝuteblaj ĉiuj numeroj de la revuo inter 1974 kaj 2017!





Kongresa kuriero *www.mallonge.net/kuriero*

La Kongresa Kuriero estas inform-bulteno, kiun volontuloj pli-malpli regule, proksimume ĉiutage, aperigas dum Universalaj Kongresoj de UEA. Ĉiu aliĝinta kongresano rajtas je senkosta ekzemplero. Ĝia enhavo dependas grandparte de la kontribuoj de la kongresanoj mem, kiuj estas petataj raporti pri siaj kunvenoj, recenzi kongresajn eventojn ktp. Ankaŭ fotoj en komputila formato estas bonvenaj, same kiel kongresaj anekdotoj kaj rakontoj.

Kutime la Kongresa Kuriero tiel nomiĝas nur en subtitolo kaj krome havas specifan titolon, kiu povas aludi iun trajton de la kongresa lando aŭ urbo. Ekzemplerojn de aperintaj kurieroj vi povas elŝuti de la bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio.

Kontakto *www.uea.org/revuoj/kontakto*

Kontakto estas dumonata revuo pri landoj, popoloj, kulturoj, socio kaj politiko. Temas pri revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), sed posedata kaj eldonata de UEA. Ĝi estas legata en ĉ. 90 landoj. Kontakto estas fondita en 1963. Ĝia redaktoro estas Rogener Pavinski el Brazilo.

Kontakto haveblas kiel PDF-dosiero. La plej novajn numerojn de la revuo rajtas elŝuti individuaj membroj kaj patronoj de TEJO, sed eblas ankaŭ aboni. La abonkotizo varias laŭ la lando kie vi loĝas (inter 6 kaj 12 eŭroj).


TAJONIA

Kongresa Kuriero de la 103a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono Vendredon, la 3-an de aŭgusto, 2018 n-ro 6

TEJO festas 80 jarojn!

Futbale pluas la malbeno: Esperanto 1-7 Lokanoj

Kiel enmovadigi la lernantojn de Duolingo?

Aŭtoraj duonhoroj:

Infana Kongreseto

HODIAŬ PLU VARMEGOS!


Ne tro vestiĝu!
Flankenlasu jakojn ks.

Trinku akvon abunde!
Kunhavu botelon; kranakvo trinkeblas.

Ne restu ĉe la suno,
preferu ombrajn lokojn
kaj/aŭ surmetu ĉapelon.

Foto-konkurso pri la 103-a UK en Lisbono

Tajo Nia 6 (2018.08.03) 1



Kosmos *www.mallonge.net/kosmos*

Kosmos estas spirit-scienca revuo de la dana Martinus-Instituto. Ĝi aperis la unuan fojon (en la dana) la 1-an de aprilo 1933. Nuntempe Kosmos aperas ĉiumonate en la dana kaj la sveda, kaj ĝi aperas kvarfoje jare en la angla, la nederlanda kaj la germana. La Esperantan version redaktas Hokan Lundberg kaj Ole Therkelsen. Ĝi aperas dufoje jare.

La Esperanta versio de Kosmos aperis iom neregule dum kvar periodoj 1946-1947, 1958-1959, 1969-1974 kaj ekde 1995 ĝis nun. En kelkaj periodoj EO-Kosmos aperis kvarfoje jare, kaj nuntempe dufoje jare, sed espereble pli ofte estontece. Laŭ deziro de Martinus la revuo Kosmos en iom fora estonteco aperos samtempe kun la sama enhavo en diversaj lingvoj.

Ne plu eblos pagi kaj aboni la paperan version de Kosmos pere de makleroj kaj UEA-konto. Sed laŭ speciala interkonsento [esperanto@martinus.dk] vi povos aboni paperan Kosmos, se vi kapablas pagi rekte al bank-konto de Martinus-Instituto.

En la retejo vi povas senpage elŝuti la PDF-version de la esperant-lingva Kosmos. Papera versio ne plu ekzistas.





Le Monde Diplomatique *https://eo.mondediplo.com*

Le Monde diplomatique en Esperanto (ankaŭ nomata DIPLO) estas la oficiala Esperantlingva eldono de la franca monatgazeto de politikaj analizoj Le Monde diplomatique.

Laŭ kontrakto inter la direktoro de la Pariza Le Monde diplomatique kun la ĉefredaktisto de Le Monde diplomatique en Esperanto, en septembro 2002, la Esperanta eldono devigas sin ĉiumonate aperigi en disponigita retpaĝo minimume la Esperantigitan ĉefartikolon; pri la ceteraj artikoloj, la Esperanta redaktejo estas libera je elekto kaj je kvanto. Plejparte, la plenaj tekstoj de artikoloj el Le Monde diplomatique estas senpage legeblaj sole en la Esperanta versio.

Eldonejo de Le Monde diplomatique en Esperanto estas la Unesko-Grupo Narbonia, kiu havas sian sidejon en Narbonio, do la regiono de Narbonne en suda Francio. En tiu asocio membras ĉiuj regulaj redaktistoj tradukistoj de la DIPLO, kiuj kune decidas pri la diversaj funkcioj (ekz-e ĉefredaktisto) kaj eldonprincipoj.

La politik-ekonomiaj analizoj de la DIPLO estas unu el la diskutbazoj por la membroj de la Monda Asembleo Socia (MAS). MAS redaktas laŭokaze paperajn eldonojn de la DIPLO, ĉefe por eventoj kiaj Mondaj Sociaj Forumoj, ankaŭ senpage konsulteblaj kaj elŝuteblaj en la retpaĝoj de MAS kaj de la DIPLO.



Libera Folio *www.liberafolio.org*

Libera Folio estas reta Esperanto-gazeto – sendependa movada bulteno – pri la Esperanto-movado sendependa de movadaj instancoj, lanĉita la 12-an de aprilo 2003. Ĝi celas sobre kaj kritike prilumi aktualajn movadajn evoluojn. Fondis ĝin István Ertl kaj Kalle Kniivilä. Ekde la komenco de la jaro 2020 denove redaktas la bultenon Kalle Kniivilä. Konstantaj kunlaborantoj estas Grigorij Arosev, István Ertl, Paweł Fischer-Kotowski, Robert Nielsen kaj Jukka Pietiläinen, kiu estis la redaktoro de septembro 2018 ĝis decembro 2019.

La ideo pri la fondo de la sendependa movada bulteno Libera Folio aperis en la unua semajno de aprilo 2003, tuj post la protesta demisio de la konstanta kongresa sekretario de UEA, Nikola Rašić. Tiu demisio sentigis la mankon de fidindaj, aktualaj informoj kaj komentarioj pri okazaĵoj en la Esperanto-movado.

Monato *www.monato.be*

Internacia Esperantlingva magazino sendependa kun artikoloj pri politiko, kulturo, scienco, moderna vivo kaj aliaj temoj. Ekzistas entute 8 diversaj versioj. La plej populara kaj unua estas la magazina aŭ "papera" versio. En 2003 aldoniĝis la PDF-formo kaj en 2008 speciala versio por saĝtelefonoj. Ekde 2011 ĝi estas akirebla en la dosierformo ePub. Ĉiuj tekstoj el la papera publikaĵo estas ankaŭ konsulteblaj en interreto.

Abonantoj povas konsulti ĉiujn tekstojn; neabonantoj ne povas konsulti tiujn de la kuranta jaro. Pliajn informojn pri la diversaj versioj liveras la retpaĝo de Monato. La abontarifo de Monato varias laŭ la lando de la abonanto.





Naturista Vivo *www.esperanto-naturismo.org*

Esperantlingva kolore ilustrita fakrevueto, eldonata ekde la jaro 1960 de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE). Naturista Vivo aperas kvarfoje jare, sur kvarfoje 16 A/5 paĝoj, ĉiufoje kun 5 engluitaj kaj kelkaj printitaj fotoj. Ekde la jaro 1999 redaktas ĝin la hungara esperantisto Jozefo Németh. **Kutime ne estas elŝutebla bitversio**, ĝuste por eviti, ke en interreto disvastiĝu fotoj de naturistoj, kiuj verŝajne ne ĝojus revidi sin en nenaturistaj retejoj. Ja INOE lanĉis belan novan retejon en 2018. La baza abonkotizo por la gazeto en eŭropaj landoj estas 15 eŭroj.

La Ondo de Esperanto *www.esperanto-ondo.ru*

La Ondo de Esperanto estas grava Esperantlingva almanako, redaktata de Aleksander Korĵenkov. Eldonanto kaj administranto estas Halina Gorecka. Inter 1998 kaj 2017 ĝi estis monata papera magazino. Ekde 2017 ĝi estis abonebla nur kiel bitgazeto. La eldonaĵo havas riĉas historion, kiun eblas malkovri en Vikipedio[8]. Ekde 2020 "La Ondo de Esperanto" aperas dumaniere: unue, kiel ĉiutage aktualigata novaĵretejo **www.sezonoj.ru**; due, kiel ampleksa tri-monata almanako en kiu estas publikigataj la plej ravaj tekstoj el la retejo kaj ankaŭ artikoloj, eseoj kaj beletraĵoj, verkitaj speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto".

Malkiel la retejo, kiu plu estas libere alirebla, la almanakon ricevas nur tiuj, kiuj abonis ĝin. Estas tri abonkategorioj: abonanto (15 eŭroj), amiko (30 eŭroj), patrono (100 eŭroj).

8 *https://eo.wikipedia.org/wiki/La_Ondo_de_Esperanto*



NATURISTA VIVO
Oficiala organo de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)
Red.: *Jozefo Németh*
naturista.vivo@gmail.com
www.esperanto-naturismo.org
Serio de la dua jarcento, 2020-03-31
N-ro 137. (1/2020)

Antaŭparolo

Ni esperas ke INOE-membroj, kaj niaj esperantistaj, naturistaj kaj aliaj geamikoj daŭre fartas bone en la nuna sankrizo. Ni esperas, ke la plimulto inter ni kaj niaj geamikoj travivos la krizon sendomaĝe. Niaj pensoj estas kun la nunaj malsanuloj de la kronviruso, kun la viktimoj kaj iliaj parencaro kaj amikaro.

Bedaŭrinde, ni informiĝis, ke Filippo Franceschi, membro de INOE la 27-an de marto 2020 en sia 89-a vivojaro forpasis pro la kronviruso. Li estis konata en Esperantujo kiel Sen Rodin, itala instruisto, fotisto, ĵurnalisto, hortikulturisto kaj esperantisto ekde 1940. Li forpasis nur kvar tagojn post la morto de sia edzino Júlia Sigmond. La estraro de INOE kaj ĉiuj membroj kondolencas ilian familion.

Varbu pri naturismo! Varbu pri Esperanto!

La valoroj de naturismo kaj la valoroj de Esperanto tute kongruas. Ili celas rilaton kaj respekton de aliuloj per rimedoj de la internacia lingvo kaj de nudeco respektive.

Pro tio, homoj kiuj parolas Esperanton ofte estas sentemaj pri argumentoj por naturismo: ili celas simplan vivon kaj ofte interesiĝas pri naturaj aspektoj de naturismo. Simetrie, homoj kiuj praktikas naturismon, ĝenerale bone komprenas la kialojn por havi kaj uzi neŭtralan internacian lingvon.

Multaj inter ni alparolas amikojn en naturista aŭ esperantista medio pri Esperanto aŭ pri naturismo. La efiko estas varia: inter miaj amikoj, kelkaj naturistoj iĝis esperantistoj kaj kelkaj esperantistoj iĝis naturistoj. Eĉ pli



Semajno de Enigmoj *www.semajnodeenigmoj.com*

Eldoniĝas ekde 2017 *Semajno de Enigmoj*, la unua gazeto de enigmoj Esperante. Ĝi enhavas klasikajn krucvortenigmojn, kriptan kaj silaban krucvortenigmojn, vortoserĉon, rebuson, aliajn vortopuzlojn, novaĵojn, kaj cetere. Aperis ĝis nun nur kvar ekzempleroj; la lasta en 2018.


Fondinto estas Luca Desiata, ankaŭ ĉefredaktoro de Hebdomada Aenigmatum (la unua gazeto de enigmoj latine) kaj de Onomata Kechiasmena (la unua gazeto de enigmoj grekantikve).


Ĉefredaktoro de Semajno de Enigmoj estas Giorgio Denti, ankaŭ prezidanto de la Roma Esperanto-Grupo.

Sennaciulo *www.mallonge.net/sennaciulo*

Sennaciulo estas la dumonata organo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), sendependa, neneŭtrala tutmonda Esperanto-asocio. Membrokotizo entenas ties abonon kaj liveradon, perrete kaj surpapere.

Ekde 2017 SAT sendas perrete al ĉiuj abonantoj kun konata retadreso la elektronikan version de la revuo. Sed ankaŭ ne-SAT-anoj povas aboni ĝin. La prezoj por jara abono varias laŭlande. De ĉiu aperinta numero vi povas libere elŝuti nur la unuajn tri paĝojn kiel PDF-dosieron.






TAKE Konstruado-kajejo *www.mallonge.net/take*

La Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE) celas arigon de ĉiuj Esperanto-parolantoj, fakuloj pri konstruado (ekde la elpensado ĝis la interna kaj ekstera aranĝado) por profesiaj interŝanĝoj kaj terminologia laboro. Ĝi eldonas ĉiujare teknikan broŝuron "Jarkolekto de TAKE" kaj ekde 2016 "Konstruado-kajero de TAKE".

Unesko-Kuriero *www.uea.org/revuoj/unesko_kuriero*

Ĉi tiu Unesko-revuo ludas gvidan rolon por antaŭenigi la mision de la organizaĵo en la kampoj pri kiuj ĝi respondecas kaj konforme al ĝia mandato: diskonigi ideojn pri internacie gravaj temoj, dialogo inter kulturoj kaj provizi forumon por internacia debato. En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora Unesko-Kuriero en formato A4, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de Unesko-Kuriero en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao. La kuneldona redaktoro de la Esperanta versio estas Andrej Peĉenkin. Dank' al la kunlaboro de 36 tradukintoj kaj provlegintoj en 23 landoj, kaj financa subvencio de la Esperanto-centro Ora Ponto, Unesko-Kuriero en Esperanto povis esti eldonata. La papera versio estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA, sed la bitversio estas libere elŝutebla de ĝia retejo kaj de la oficiala retejo de Unesko-Kuriero.

En 2019 UEA akceptis la peton de El Popola Ĉinio, kiu proponis kiel kuneldonanto plenumi la eldonan taskon fare de Trezoro Huang Yinbao. La mono venos de la ĉina registaro.





Vento *https://mallonge.net/vento*

Veksilologia revuo en Esperanto. Ĝin eldonas kvarfoje jare la "Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo" kunlabore kun la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.



Bitgazetoj regionaj: Afriko

Esperanto Plus *https://esperantoplus.jimdo.com*

La financaj rimedoj en Afriko estas limigitaj. Tial Jean-Pierre Marcq kaj Evelyne Rotellini kreis la fondaĵon Esperanto Plus. Ĝi celas subteni spertajn esperantistojn (nuntempe en Afriko), kiuj ne havas laboron, provizante ilin per vivrimedo kadre de disvastigado de Esperanto. Interalie dank'al ili, kelkaj esperantistoj povas okupiĝi pri eldonado de gazeto.

Afriko: Esperanto en Afriko *www.esperanto-afriko.org*

Trimonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko. Ĝin redaktas Adjévi Adjé el Togolando.

Malagasio: Panoramo de la Granda Insulo
www.mallonge.net/panoramo

Monata gazeto kiu raportas ekde 2014 pri la vivo de simplaj civitanoj en Malagasio (ankaŭ nomata 'Madagaskaro'), iliaj kulturo kaj lingvo, la historio de la lando ktp. La gazeto aperas en PDF-formo. Eblas samtarife akiri ĝin en papera formo por tiuj, kiuj loĝas en Francio. Jarabono (10 numeroj) kostas 30 EUR.



ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA — 14-a jaro, n-ro 40(2020:1)

Karaj legantoj,

En la du unuaj monatoj de la jaro 2020, same kiel en la periodo inter pli antaŭe, multaj Esperanto-renkontiĝoj kaj agadoj okazis kun sukceso en diversaj regionoj de la kontinento dank' al la kunlaboro kaj klopodoj de esperantistoj.

Ĝuste tiu ĉi nova numero de la bulteno prezentas tiujn realiĝojn: tutkontinentan kongreson jarfine en Bujumburo, Tagon de Esperanto-libro, ankaŭ konatan kiel la Zamenhofa Tago, seminarion por virinoj en Benino, movoj̆n en Tanzanio, kongreson en Togolando, seminarion de la Goma Esperanto-Klubo, kunvenon en Ganao k.t.p. Eblas krome legi en la bulteno anoncon de la Afrika Komisiono de UEA pri la lando de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto kaj multajn aliajn iniciatojn de esperantistoj, precipe de la afrikanoj por ĉiam pli alten teni la verdan standardon en la hejmkontinento de la homaro.

Certe la realigo de tiuj ĉi agadoj montras ankaŭ la meritojn de la amikoj de Afriko kaj de diversaj ali-kontinentaj helpoasocioj, kiuj prenis sur sin akompani afrikajn aktivulojn kaj lokajn movadojn en la unuopaj landoj.

Dankon kaj bondezirojn al ĉiuj!

La redakcio

****

Miora: mi gvidis virinan kunsidon kaj kuraĝigis ilin

Miora Raveloharison, e-istino kaj pastorino el Madagaskaro, estas la sola virino el la kvar membroj de la Afrika Komisiono kiuj partoprenis en la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) en Bujumburo, Burundo, inter la 21-a kaj 27-a de decembro 2019 .

Kaj ŝi sentis egan plezuron: *mi partoprenis en la AKE. Mi ĝuis la kongresen etoson en Bujumbura: kongresejan verdaĵon, kunestadon kun ĝentilaj kongresanoj, ekskursojn al la termika akvejo sur la monto Mugara, Tanganjika lago ktp.* Pluiras ŝia rakonto: *mi povis rekte konatiĝi kaj babili kun la enkontinentaj kaj alimondpartaj geesperantistoj, ĉar mia hejmlando estas insulo, ni do malofte povas renkontiĝi kun esperantistoj alilandanaj. Partoprenantoj kongresumis kun ĝojo kaj amo.* "Amo" iĝis nia kongresa frapvorto plenan semajnon.

Miora ne nur profitis la kongreson, sed ankaŭ aktive kontribuis al la riĉigo kaj realigo de ĝiaj programoj, *mi povis ankaŭ ludigi kongresanojn per kunigaj kaj rapid-refleksaj ludoj. Dum la tago de la Kristnasko mi aparte lernigis kristnaskajn kantojn al geamikoj. Mi gvidis virinan kunsidon, dum kiu mi per prelego kuraĝigis ilin pli aktive kaj diligente agadi por Esperanto.*

Fine, la malagasa komisionanino dankeme kaj feliĉe konkludas, *dankon al la AK-anoj, al la tuta kongresa organiza teamo kaj al ĉiuj partoprenintoj, ĉar ni ĉiuj kune realigis mojosan renkontiĝon kun ĝojo kaj amo. Espereble... ĝis la 8-a AKE!*

Miora Raveloharison

Esperanto en Afriko n-ro 40



PANORAMO DE La Granda Insulo

Nº 06/2018 — Juin — € 30 la jara abono

ekde 2014 aperas monate krom en julio kaj aŭgusto

NECERTECO PRI LIBERA BALOTADO

Maitsoila elvidado

Post la devigа decido far la Alta Kortumo pri Konstitucio, la ĉefministro Solonandrasana Olivier demisiis. En la poeltagnezo de la sama tago, la litatesro anoncis la nomumadon de la nova ĉefministro Ntsay Christian. Temas pri la kandidato el al dua listo pro-Rajoelina, precidento dum la transira jaonarimampianina do elektis la plej punkto de observantoj. Ntsay Christian por garantii la organizadon de balotado Ĉiuj des pli ke li kutimas kunlaborі kun la decido provokis ĝeneralan kontestomanifestaciantoj sur la Place la 13a de nifestacio antaŭ unu monato. la 73 dekdera ke ilia unuiĝo decidos kiu iĝos rigi la novan registaron kaj disdividis la tio el la rezulto de la lasta eleldado de deputitoj antaŭ kvar jaroj. La ĉefa misio de tiu nova registaro estas la preparado de la prezidenta elektado. 57 jaraĝa, Ntsay Christian devenas de Antaranarana en la nordo de Malagasio. li estis jam ministro pri turismo de 2002 ĝis 2003 kaj respondecis pri multaj gravaj postenoj ŝtataj kaj de internaciaj organismoj.

Ĉefministro NTSAY Christian

Festivalo de balenoj 2018

Laŭ la eksministro pri turismo, la ĉefaj celitoj de la festivalo de balenoj 2018 estas la turistoj el la insulo Reunio. Tamen, aparta tarifo de 610.000 ariary (ĉ. 154 eŭroj) estas por la lokaj turistoj. La ideo pri protektado de marmuloj estas la ĉeftemo de la ĉijara festivalo de balenoj, kiuj ja atingas sian kvaran okazigon. Ĉiuj devas kontribui al la sukcesigo de tiu internacia evento en nia insulo Sainte-Marie kaj ĉiuj aniaĵoj devas profiti el ĝi ĉar ĝi estas atendata de multaj hoteloj kaj restoracioj. Tiu evento konsistas el aperigo de balenoj, kiu ebligas al turistoj observi tiujn mamojn marmuloj̆n. Konferencoj, foiroj por ekspozi. lud-sekvaĵoj kaj sportoj, kiuj kaj diversaj koncertoj plenigos la programon de la festivalo. La ĉefa respondeculo de la evento asertis ke la okazigo de la ĉijara festivalo estos malsama ol tiu de la antaŭaj jaroj.

Stumbla recenzado ?

La registaro plenumas nun la trian ĝeneralan recenzadon de la popolo sed la celitoj sin montras iom sidetenaj pri la celiĝ kaj maniero ĝin fari. Fakte, la kampanjo pri ĝi ne kapablis transmeti la ĉefan mesaĝon nek la grevecon de tiu recenzo en la vivo de la nacio. Tiel konstatis la agentoj de la nacia instituto pri statistiko, kiu prizorgas pri la recenzado. La popolo ja sin detenas provizi informojn pri si. Krom demandoj pri la personaj informoj, la enkarto postulas sciindaĵojn pri la nombro de la samdomanoj kaj iliaj respektivaj laboroj, pri la hejmaj ilaroj elektraj. Tiaj demandoj estas perceptataj de la civitanoj kiel tro intimaj tiel, ke ili ne korekte respondas al ili malgraŭ tio. ke la respondoj restos konfidencaj. Des pli ke la problemo pri malsekureco pli kaj pli gravas ĉiutage. Notindas ke la lasta oendado de la popolo okazis antaŭ 25 jaroj. La celoj estas do koni ne nur la nombron de la popolo sed ankaŭ ĝian vivnivelon.

(daŭrigata sur la sekvanta paĝo)

Bitgazetoj regionaj: Ameriko

Brazilo: Brazila Esperantisto *www.mallonge.net/brazila*

Oficiala organo de la Brazila Esperanto-Ligo, fondita en 1907. La gazeto celas informi la legantojn pri la Esperanto-movado kaj pri kulturo. Aperas do raportoj, intervjuoj kaj artikoloj pri diversaj temoj.


Kelkaj malnovaj estas libere elŝuteblaj en PDF-formo. Malklaras, ĉu eblas aboni la bitversion de la gazeto.

Respondeca ĵurnalisto: Alberto Emerson Werneck Dias. Ĉefredaktisto: Francisco Stefano Wechsler.

Brazilo: Gaja Haveno *www.esperantors.net.br/gajahaveno*

Revuo kiun redaktas César Dorneles Soares el Porto Alegre. Ĝi estas kreita en 1997.





Brazilo: Komunikoj *www.editoralorenz.com/p/komunikoj.html*

Trimonata bulteno de Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz. Ĝi estas fondita en la jaro 1975 kun la celo disvastigi spiritismon inter esperantistoj. Laŭ la kolofono la bulteno havas ĉirkaŭ dudek mil legantojn en la tuta mondo. Ambaŭ la interreta kaj la papera eldonoj estas senpagaj. En la retejo oni proponas ISUU-versiojn.

Brazilo: La Lampiro *www.mallonge.net/lampiro*


La Lampiro estas la oficiala organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP). Ĝi estas konsiderata unu el la plej longedaŭraj Esperantaj organoj en Brazilo; ĝia unua numero aperis en 1959.

Nuntempe redaktas ĝin d-ro Paulo Sérgio Viana, kiu estas ankaŭ estrarano de la asocio. Jarkolektoj ekde 2016 estas senpage elŝuteblaj de la (portugallingva) retejo.

Kanado: La Riverego *www.mallonge.net/riverego*

La Riverego estas la oficiala bulteno de Esperanto-Societo Kebekia. Ĝi estas dulingva franca-Esperanto kaj publikigita kaj sendita al membroj kiel PDF-dosiero. Redaktado kaj grafiko: Ĵenja Amis.

En la retejo de la asocio aperas arkivo kun ĉiuj numeroj kiuj aperis ekde 1986.







LA NOV-JORKIA
ESPERANTISTO

ISSN 2573-6108

Esperantumado en la Imperia Ŝtato
Volumo 3 Numero 2 Novembro 2019

Malkaŝita Muziko de Félicien DE MÉNIL

Timoteo BORONCZYK, Esperanto-Societo de Sirakuso

62 L'AME ENFANTINE

Musique de F. de Ménil. — 28. — LE PETIT OISEAU — Paroles de Marc Legrand.

Simplement.

Oh! le cher pe - tit oi - seau En - cor sans plu - mes! Tem-blé de son haut ber - ceau, A fai - re de pe-tits sauts Il se cou-ra - ge, En - cor sans plu - mes.

La melodio de la kanto *Le Petit Oiseau* de franca esperantisto kaj komponisto Félicien Menu DE MÉNIL (skanaĵo de la Nacia Arkivo de Francujo).


Mi foje pensas pri Félicien Menu DE MÉNIL, la verkinto de la melodio de la esperanta himno, *La Espero*. Kiun alian muzikon li verkis?

Bedaŭrinde, informoj pri DE MÉNIL estas malmultaj, kaj liaj muzikaj verkoj estas apenaŭ troveblaj. Do, kiam mi eksciis, ke rilatajn dokumentojn havas la Nacia Arkivo de Francujo, mi tuj forblovis la polvon de mia franca/angla vortaro kaj skribis retpoŝton al la arkivisto, petante kopiojn.

Post kelkaj semajnoj (kaj eŭroj) mi ricevis la unuan bitigitan dokumenton, infana kanto nomita *Le Petit Oiseau* (La Malgranda Birdo). Kia ekscito! Jen muziko, veršajne kiun neniu aŭdis ekde pli ol jarcento!

Le Petite Oiseau estas simpla kvarfraza kanto en 3/4-takto. Samkiel *La Espero*, ĝi komenciĝas per kvarmezura enkonduko kaj uzas arpeĝojn por krei melodion. La unua frazo

daŭrigo en paĝo 4



La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

sabaton, la 7an de Julio, 2017 • numero kvin

Hodiaŭ

- 7:15 atm: Matenmanĝo
- 8:30 – 12:15 ptm: Lecionoj (Alexander, Kováts, Löwinsohn)
- 12:15 ptm: Tagmanĝo
- 2:00 – 3:30 ptm: Ekzercado kun Katalin
- 3:30 – 5:00 ptm: Lecionoj (Vergara)
- 5:30 ptm: Vespermanĝo
- 7:00 – 8:15 ptm: KTP: Diskuto kaj analizo de malfilmoj filmetoj *Filmo 110*
- 8:00 ptm: JuveLiva - La Arto kaj Tekniko de Vitrĵuĝ - Katalin Kováts *Aktoradrivo de Katalin*
- 8:45 ptm: OJAjo

Angulo de la verkemulo: Kobolda vespermanĝo

de Aleksandr Ivanov (NASK)

La nokto atendis vidi unu el la loĝ laborantoj en la kafejo, sed tio ŝi estis, ke ne gnomo aŭ kobold, ĉu homo ligita en neto kaj malridevar la stango.

La pureja kleronloĝ monteto al la kobolds sian manĝaĵon. Ŝi pureja ĝin de li kaj metis ĝin en sian mallekon. "Ĉu estas la lasta manĝo aŭ via karto. Ĉu vi volas rejuĝi ĝin?"

"Ne, ne, dankon mi estas ĉirkaŭ sennova."

"Bone. Ĉu vi volas la ĵlajon ankaŭ kokajon?"

"Ah, la fiĝjon. Mi ne povas, ke mi iam aŭtaŭ vidis, ŝi aĉas, la kobolon laborantas ĉi tie."

Ŝi diĝis ĉiun suspicon. "Ne, mi kutime laboras kun la alia diĝo. Ĝi ripozu aŭ suspendis ŝi vidis!"

Nu, estas bone vidi vian popolon prokaŭras."

"Mi diris. (ŝi ridis) ŝi suspendis!"

"Ha, ĉiuj, mi petas! Ĉu la kobolo estis kulpon da ĉio sur kun telefono, ebla pli forta ol ricevu "Ha, kiam via laborrefingis!"

Ŝi skuis la kapon iomete. "Kiel?"

"Mi petas, ke ĉiu ripozu, ŝi aĉas, ami kune. Ni povas spekti filmon, ĉu ne?"

Per tio ŝi estis la kafejon. "Ni ne diris al mi, ke vi estas sennova."


"Na, eble."


"Nu, ni diris. Nur ĉiu. Kaŭzon ni pasper!"

Ha! Ŝi diris. La klopodis monti ni malgrandan rideton. "Kaŭzon, mi petas. Ĉu eble mi vidi vin ĉi la morgaŭ?"

La kobolde rigardis lin rekte en la okulojn kaj prakliĉ minaco. "Ne, ĉar hodiaŭ estas via lasta tago."

★







La Rivereto

Marto 2020 (speciala eldono)| Jaro 36, No 139-140
Esperanto-Societo Kebekia, kunlabore kun Kanada Esperanto-Asocio
esperanto2020.ca | uea.org/kongresoj/alighilo



Kubo: Esperanto Cuba *www.mallonge.net/cuba*

Trimonata bulteno por komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de Kuba Esperanto-Asocio. Ĉefredaktas kaj enpaĝigas ĝin Alberto Fernández-Calienes Barrios. La lasta numero aperis komence de 2018.

Usono: La Nov-Jorkia Esperantisto *www.mallonge.net/novjorkio*

La Nov-Jorkia Esperantisto raportas pri esperantaj eventoj kaj agadoj, kiuj okazas en la ŝtato Nov-Jorkio. La bultenon eldonas la Esperanto-Societo de Sirakuso kunlabore kun Binghamton Esperanto, la Esperanto-Klubo de Bufalo, la Mohawk-Hudson Esperanto Club, la Esperanto-Klubo de Roĉestro, kaj la Esperanto-Societo de Novjorko. En majo 2017 aperis ĝia unua numero. Ĉiuj aperintaj numero estas senpage elŝuteblaj de la retejo.

Usono: La NASKa fasko *www.mallonge.net/naskafasko*

Ĵurnalo kiu aperas ĉiutage dum la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK). La Fasko estas ne nur informilo por anonci venontajn programojn, sed ankaŭ forumo kie lernantoj povas aperigi artikolojn, poeziaĵojn, kaj aliajn originalajn tekstojn diverstemajn.


1 / 2018

esperanto-cu

TRIMONATA BULTENO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO


9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto: daŭripovo en la centro

Usono: Saluton! *www.mallonge.net/saluton-bulteno*

Monata bulteno de la Esperanto-societo de Ŝikago.

Usono: Usona Esperantisto *www.esperanto-usa.org/bulteno*

Dumonata bulteno de Esperanto USA. Ĝi enhavas diversajn artikolojn pri Esperanto kaj la movado, librajn recenzojn, listojn de novaj libroj, kaj informon pri Esperantaj turismaj okazaĵoj. Redaktas ĝin Hoss Firooznia. Por elŝuti la plej novan numeron, necesas esti membro de Esperanto-USA. Pli malnovajn jarkolektojn (ekde 1988!) vi povas elŝuti senpage de la arkivo de la retejo.



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 12 Decembro, 2019

Karaj leguntoj, Zamenhofa tago – post unu semajno! Ĝi estos la 160-a datreveno de nia Majstro kaj ni devas digne festi ĝin. Estas planata kultura programo, kiel lingva festivalo, prelego pri la poezio de L. Zamenhof kaj a.s. Por la lingva festivalo estis elektita la plej unua E-poemo (el La Unua Libro) "Ho, mia kor'" (vd. malsupre). Mi aldonas ankaŭ la anglan tradukon (ne mikso kun moderna usona dialekto de la angla) de M. Boulton – prof. de Oksforda Universitato, fakulino pri la lingvo de Ŝekspiro. Ĉiuj alilingvaj tradukoj estas bonvenaj, ekzamenu ilin. Dankon!

Urĝa memorigo: venontjare la UK de Esperanto okazas en aparta lando – en Kanado, en ĝia franclingva provinco Kebekio, pli ĝuste – en Montrealo. Dezirantoj, ne forgesu aliĝi ĝis la Nova 2020 jaro kaj vi gajnos!

Do, kara leganto, agu! **Viktoro-redaktoro**

Ho, mia kor' *L. Zamenhof*

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'?
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!

1887

O heart, my heart, O do not throb so wildly,
Nor wildly from my bosom, throbbing, start!
I cannot be composed, sit calmly, idly..
O heart, my heart!

O heart, my heart! The crucial hour is coming
Shall I not win when I have played my part?
Enough! be calm! no more of this wild drumming –
O heart, my heart!


Traduko de Marjorie Boulton
De "Biografio de Zamenhof"

En Eŭropo: Ukrainio-Italio

La mondo estas libro, kaj kiu ne vojaĝis tra ĝi, tiu legis nur unu paĝon de la libro. Ĉi tiuj saĝaj vortoj de Adgusteno Aurelio tre trafe klarigas, kial homoj estas allogataj ekster la horizonton, al aliaj landoj. Ĉar oni ĉiam volas scii, kio estos en la sekva paĝo.

Antaŭ nelonge mi vizitis Sicilion en Italio. Ŝerce mi diris al ĉiuj miaj gekonatoj, ke la celo de mia vojaĝo estas partopreno en la kunveno de sicilia "cosa nostra". Sed fakte la kialo estis alia: mi estis invitita al la premiada ceremonio de la internacia konkursoj "Poezio el ĉiuj ĉieloj" kaj "Balado por Esperanto" organizitaj de Esperantista Sicilio kaj ĝia gvidanto — Giuseppe Campolo, kiu okazis la 18-an de oktobro 2019 en la salonego de klasika liceo "Maurolico" en Mesino (Sicilio, Italio). La celo de la konkurso "Balado por Esperanto" estis trovi muzikigindajn versojn, kiuj sukcesu esprimi la profundan signifon de Esperanto kaj aspiron al harmonia kunvivado de homoj. Kaj mia poemo "Mi kredas", gajninta en la konkurso la unuan premion, estis tradukita al la itala lingvo kaj muzikigita de la konata itala komponisto kaj orkestrestro Biagio Ilacqua kaj kantita de belega sopranulino Romilda Mangraviti (https://www.facebook.com/petro.palyvoda/videos/ 3290141237725184/).

Sicilio estas bela lando. Ĝi estas la plej granda provinco en Italio. Ĝia tuta teritorio konsistas el insuloj, 98% el kio estas Sicilio mem, kiu estas apartigita de la kontinenta Italio per la markolo de Messina. Sur la insulo Sicilio situas la aktiva vulkano Etno, kiun mi tamen vidis nur el la aviadila fenestreto. Sed mi vizitis plurajn mirindajn siciliajn urbojn: Mesino, Modica, Pozzalo, Catania kaj Taormina. Kaj en ĉiu el ili mi ĝuis ne nur belegajn monumentojn, sed ankaŭ varmajn ondojn de Mediteranea Maro. Kaj tio estis en tiu periodo, kiam la vetero estis malvarmega en mia Ukrainio. Tiu bonega tempo restos por ĉiam en mia memoro. Kiel diris Homero, la gasto neniam forgesos la gastiganton, kiu akceptis lin varme. ***Inf. Petro P.***



Bitgazetoj regionaj: Aŭstralio


Aŭtralio kaj Novzelando: Esperanto sub la Suda Kruco *www.mallonge.net/esk*

Organo de la Aŭstralia kaj Novzelanda Esperanto-Asocio. Ĝi plenas de informoj pri lokaj Esperantaj eventoj, libraj recenzoj, interretaj sugestoj, ŝercoj, konkursoj, klarigoj por komencantoj, kaj multaj aliaj utilaj kaj interesaj novaĵoj. Fine de la revuo estas paĝo en la angla por homoj kiuj hazarde trovas la revuon kaj (ankoraŭ) ne komprenas Esperanton.

Redaktistoj: Terry Manley, Joanne Johns. Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers.

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA). Por havi aliron al la plej aktuala numero (PDF) oni devas esti membro de unu el ambaŭ asocioj, sed pasintaj eldonoj estas libere elŝuteblaj.





Bitgazetoj regionaj: Azio

Azio: Esperanto en Azio kaj Oceanio *www.mallonge.net/azio*

Revuo de la Komisiono de UEA pri la Azia Esperanto-Movado. Ĝi celas disvastigi Esperanton en tiu ĉi parto de la mondo. Per la paĝoj de la bulteno, ĝiaj legantoj povis sekvi la disvastiĝon de Esperanto en landoj, kie ĝi delonge dormis; konatiĝi kun novaj kaj brilaj aktivuloj; kaj ekscii pri novstilaj kaj sukcesaj aranĝoj kaj projektoj.

Ĉinio: El Popola Ĉinio *www.espero.com.cn*

El Popola Ĉinio (EPĈ) estas ĉina Esperanta revuo aperanta ekde 1950. Ĝi aperis ĉiumomate papere ĝis 2000. EPĈ nuntempe estas Esperanta novaĵretejo entenante novaĵojn, artikolojn, videaĵojn kaj aliajn interesaĵojn. Ĝi celas disvastigi Esperanton en Ĉinio kaj diskonigi la landon al la mondo.

Ĉinio: Informilo de ĈEL *mallonge.net/informilo-cn*

Lastatempe Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) klopodas plibonigi sian servon al membraro, kaj plioftigi informadon pri Esperanto. ĈEL lanĉis kontojn en Wechat kaj Douyin (poste ankaŭ en Facebook), modernigas la administradon de membroj, kaj publikigis la novtipan Informilon de ĈEL sur interreto.



Esperanto en Azio kaj Oceanio

n-ro 107, Aprilo 2020

Bulteno de KAOEM

Azia-Oceania Komisiono de UEA pri Azia-Oceania Esperanto-Movado

"Sociala distanco" nun nepre teninda tamen ne difektu solidarecon de homoj!

KAWAMOTO Hiromi (redaktoro)

Pri la novtipa koronviruso multaj avertas, ke la epidemia kaj ekonomia damaĝo eble pligrandiĝos ĝis la nivelo kiun la homaro iam ne spertis, se ni ne faros solidare "militi" kontraŭ la viruso. Kaj la rimedo por la kunlaborado estas eĉ mala de nia kutima imago; ni devas ne kunveni manenmane, sed fizike distanci de aliaj homoj kaj izoliĝi restante hejme, kiel facile klarigas infektadon ekzemple la artikolo de "Washington Post":

https://www.washingtonpost.com/graphics/2020/world/corona-simulator/

Kaj kompreneble ankaŭ esperantistoj senescepte aliĝu al la solidareco. Esperanto devas esti peranto de **egaleco** kaj **paco**, sed **ne** de **viruso**. Eĉ restante hejme ni povas rete interligiĝi kaj interŝanĝi informojn kaj opiniojn. Kvankam hejme katenita vivo certe nin turmenti povas, tamen **ĉie nepre troveblas vojo, nur se de ni ne perdiĝas ĝojo**. Kaj la verdaj vortoj venu al mi mem, se la situacio draste plimalfaciliĝos ĉe mi. (Kaŭa)

daŭrigota al la paĝo 23 ☛



Ĉinio: Penseo *www.mallonge.net/penseo*

Monata beletra revueto en Esperanto kiu aperas preskaŭ ĉiumonate ekde 1990. Ĝi precipe publikigas poemojn.

La ĉefredaktoro de Penseo estas s-ro Yida Wei (Vejdo). Ĉiuj numeroj estas libere elŝuteblaj en PDF-formo de la retejo.

Israelo: Israela Esperantisto *www.mallonge.net/israela*

Israela Esperantisto estas la organo de Esperanto-Ligo en Israelo (ELI). Ĝi aperas du fojojn jare kaj prezentas raportojn de Esperanto-aranĝoj kaj la agadon de ELI. Ĝin redaktis dum multaj jaroj Amri Wandel. La redaktadon transprenis en 2019 Mikaelo Lineckij. Ĉiuj numeroj estas libere elŝuteblaj en PDF-formo de la retejo.

Irano: Irana Esperantisto *www.mallonge.net/irana*

Irana Esperantisto estas kultura sezon-revuo sendependa en Esperanto kaj la persa. Ĝia persa nomo estas Pajame Sabzandišan (laŭlitere: Mesaĝo de Verdpensuloj aŭ Verdideanoj). Preskaŭ duono de ĉiu n-ro estas en Esperanto kaj duono en la persa.

PDF-versioj de la aperintaj revuoj aperas en la Bitarkivo:

www.bitarkivo.org/gazetoj/iranaesperantisto


PENSEO

N-ro 343

maj. / 2020

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 31-a jaro http://www.eterne.cn/penseo/penseto.htm

Profundan funebron al s-ro Hu Guozhu

S-ro Hu Guozhu (1948-2020), fama ĉina esperanto-verkisto kaj tradukisto, forpasis hieraŭ lib dudeku al 0 la cirkon da sendaĵoj, kun mi sentis enteŭ pli ol dekjarig, por esprimi mian profundan funebron.

Rimportreto Guozhu

I.

Guozhu, patro de ĉinesk' amenaj,
inicianto diligenta,
per kreiva kapabla talenta,
ĉiam pensas en ĝarden' poema.

Li kultivis kun klopod' prisenta
pra-ĉinekaja idoja zorgosenta.
Guozhu, patro de ĉinesk' amenaj,
inicianto diligenta.

Ja novuloj por prosper' verdgenta
elbakadas kun sajne' prudenta,
cele al perfekto fin-momenta,
dufoe marŝas jen per forto rena.
Guozhu, patro de ĉinesk' amenaj

II

Guozhu, de vulp-frej la fleganto,
tradukadis Liaozhai kun fervoro.
Murakentejo, kun zorgema koro,
li volvis per vent' de Esperanto.

Ĉiuj, pec' post peco, li en kvanto
levun cent ĉvita, pena en laboro
Guozhu, de vulp-frej la fleganto,
tradukadis Liaozhai kun fervoro.

Fous li senhalte en konstanto
el la ĉina kultura trezoro
diligente, pene, sen hngvoro,
por E-lingv' de ŝija eleganto.

Guozhu, de vulp-frej la fleganto.

III.

Guozhu, sealaca verkant' fruktdona,
verkas, skribas vere kaj sincere.
Laŭdas bon-sfloregn' la prefere,
pikas manvon li per bat' bastona.

Populacas lia lingvo bona,
oni legas ĝue, laŭtvere.
Guozhu, sealaca verkant' fruktdona,
verkas, skribas vere kaj sincere.

Karl erudito ĉiokona,
Li verkadis vole kaj libere,
Servoze nŭ pnkonsadere,
por movado espera, imposa.

Guozhu, sealaca verkant' fruktdona.

IV

Guozhu, eloĉverta oratoro,
kuraĝigas kaj auspicias vere



Japanio: La Revuo Orienta *www.mallonge.net/orienta*

La Revuo Orienta estas monata organo de Japana Esperanto-Instituto (JEI) fondita en 1920. Ekde 2010, membroj de la asocioj povas ricevi la revuon PDF-forme. La enhavo de la ĉefaj artikoloj estas ankaŭ mendebla kiel MP3-dosiero kaj ekzistas brajlo-versio. Masanori Fukuda de la Japana Esperanto-Instituto konfirmis al mi ke ekzistas PDF-abono. Jara abonkotizo estas JPY 5000 (37,85 EUR).

Turkio: Turka Stelo *www.mallonge.net/turka*

Turka Stelo naskiĝis kiel la monata kaj senpaga bitrevueto por la turka esperantistaro en januaro 2016. Ĝia celo estas provizi legaĵojn de ĉiuj niveloj al la lernantoj de Esperanto.

En Turka Stelo ne troviĝas politikaj novaĵoj, sed nur novaĵoj el Esperantujo, kaj novaĵoj pri kulturo kaj arto. Kelkaj eksterlandaj esperantistoj kontribuas al la revueto pere de iliaj verkaĵoj. Aperintajn numerojn oni povas libere elŝuti en PDF kaj (ekde majo 2018 ankaŭ) ePub.





Bitgazetoj regionaj: Eŭropo

Aŭstrio: La Bulteneto *www.mallonge.net/bulteneto*

Dulingva magazino eldonata en Vieno. Ne ekzistas retejo; eblas aboni ĝin nur per retmesaĝo al esperanto@chello.at. Aperintaj ekzempleroj estas troveblaj en la bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio.

Tekstoj: Familio Klag.

Redaktejo - eldonejo - presejo: Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio.

La cifereca versio estas senkosta. La paperan version ricevas donace: Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, Aŭstrio; aliaj bibliotekoj post peto.

Aŭstrio: Sat-Iroj

Satira revuo eldonata de familio Klag en Vieno. Ne ekzistas retejo; eblas aboni ĝin nur per retmesaĝo al esperanto@chello.at.

Tekstoj: Familio Klag.

Redaktejo - eldonejo - presejo: Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio.





HORIZON-TAAL

mei - juni 2020 Jaargang 52 - nummer 303



Esperanto kaj la kronviruso
Telegram: senpaga tujmesaĝilo

Senlime
Groupe espéranstiste de Verviers
Avec le soutien de la Fédération Wallonie-Bruxelles

En cas de non-distribution, merci de renvoyer à l'éditeur responsable:
Jean-Marie **Jacques**,
5 rue Joseph Wauters
BE-4800 VERVIERS

Informations en français
Informoj en la franca lingvo:
Tel. +32-(0)87/33.02.92
Mail: jeajacques@voo.be
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands
Informoj en la nederlanda:
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren.media@planet.nl
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch
Informoj en la germana:
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: klaus.hogen@web.de
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblis ĉe
www.senlime.org

Prezoj por BE, NL kaj DE:
Unuopa n-ro : 4 EUR
Jara abono : 12 EUR

Abono al la **papera** versio de nia informilo (12 €) eblas sed **NE** enhavas la kotizon al ***Senlime*** (10 €).

Bonvolu pagi prefere jam en januaro

La VoCo de Esperanto-grupo Verviersa

TRIMONATA INFORMILO PRI ESPERANTO EN LA VERVIERSA REGIONO

ENHAVO :

p. 1: Corona virus!
p. 2: Verviersa kalendaro 2020 (1)
p. 3: Niaj programeroj lupee
p. 4: Verviersa angulo ("*Zink*", libro de D. Van Reybrouck)
p. 5: Apprenez l'espéranto (leçon 1)
p. 6: Apprenez l'espéranto (leçons 2, 3, 4)

Nous sommes au regret de devoir vous annoncer la suspension de nos activités pour une longue durée: celle, hélas imprévisible, de cette pandémie Corona-virus. En attendant, rendez-vous sur internet!

Cependant une réunion exceptionnelle du groupe espéranstiste de Verviers a pu se tenir, en janvier (en petit comité), à la demande de la RTBF, pour une émission télévisée «Tout le BazArt» consacrée à l'écrivain David Van Reybrouck, qui a tenu à emmener la présentatrice, Hadja Lahbib, au Sélect, mentionné dans son petit livre «Zinc» (traduit en espéranto – extrait en page 4)! Vous devriez encore pouvoir voir ou revoir cette émission sur RTBF AUVIO:
https://www.rtbf.be/auvio/detail_tout-le-baz-art?id=2608356&t=374

En cette période, prenez soin de vous, quel que soit votre âge. Je vous rappelle que selon le journal «La Dernière Heure», on déplore le décès d'une jeune fille de 12 ans, frappée par le Corona-virus, dont les parents avaient en vain appelé les secours en... anglais: ils n'ont pas été compris. On attend bien entendu les conclusions de l'enquête ouverte mais nous ne pouvons que vous rappeler de vous méfier des slogans tels que *«Avec l'anglais on va partout»*: c'est une affirmation complètement exagérée et nous nous devons de vous rappeler qu'il existe une meilleure solution: l'espéranto, bien plus facile à apprendre... et à comprendre. Si vous n'avez pas internet, vous pourrez l'apprendre grâce à notre ancien cours pour radio Barcarolle (Lambermont), dont les 4 premières leçons terminent ce numéro (p. 5 et 6) et les 6 dernières vous parviendront ultérieurement (pour progresser valablement, limitez vous à une leçon par semaine, mais répétez-la plusieurs fois/jours dans la semaine).

esperanto Wallonie

ni faris
Tutbelga Zamfesto
Seminario en VUB

ni faras
Kiel paroli pri
Esperanto ?

ni faros
BEF-tago en Bruselo
Seminario en ULB
PEKO en Tilff

FÉDÉRATION WALLONIE-BRUXELLES



ESPERANTO EN MARCHE

Revue trimestrielle belge

Hiver 2020 - n°1

Belgio: Espéranto en marche *www.mallonge.net/eem*

Revuo de la valona asocio APE (Asocio Por Esperanto). Ĝi estas grandparte en la franca lingvo. Aperintaj numeroj ekde 2015 aperas en la retejo de la asocio.

Ekde 2019, Jean-Pol Sparenberg redaktas Espéranto en marche. Kunredaktas kaj enpaĝigas ĝin Yves Nevelsteen.

Belgio: Horizon-taal *www.esperanto.be/horizontaal*

Dumonata dulingva gazeto de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Ĝi celas informi pri internaciaj lingvaj realaĵoj kaj atentigi pri lingva egaleco.

Unu el ĝiaj celoj estas fari homojn pli internacie konsciencajn pri lingvoj, konsiderante lingvajn minoritatojn. Ĉiuj numeroj, krom la ses lastaj, estas libere elŝuteblaj en PDF-formo de la retejo de FEL.

Belgio: Voĉo *www.mallonge.net/senlime*

La asocio Senlime publikigas por siaj membroj trimonatan informilon (plejparte en Esperanto, kelkfoje en unu el la landlimaj lingvoj). Redaktas ĝin Jean-Marie Jacques.

La lasta numero de la gazeto estas senpage elŝutebla de la retejo. Aperintaj numeroj de la informilo estas/os elŝuteblaj de la reta arkivejo.

Britio: La Brita Esperantisto *www.mallonge.net/lbe*

La Brita Esperantisto (LBE) estas gazeto de Esperanto-Asocio de Britio (EAB). Ĝin redaktas Ian Carter kun helpo de Tim Owen.

LBE aperas du fojojn jare: printempe kaj aŭtune. EAB-membroj povas rekte elŝuti la aktualan numeron kiel PDF-dosieron. Necesas koni pasvorton. Sed la paĝaro arkivas ankaŭ la tekstojn kaj bildojn de pasintaj numeroj.


Ĉiuj eldonoj krom la lasta de LBE estas senpage haveblaj en PDF-formo en la retejo.

Britio: Esperanto en Skotlando *www.skotlando.org/eesarchive*

La Esperanto-Asocio de Skotlando eldonas la revuon "Esperanto en Skotlando", kiu enhavas artikolojn kaj en la angla kaj en Esperanto. Ĝin lanĉis *la Kvaropo* kiel portilon por siaj verkoj kaj por verkoj de aliaj skotaj verkistoj. Ili bonvenigas artikolojn de Skotlando kaj aliloke. Redaktas la revuon Ed Robertson kaj Hju Rid.

Aperintaj numeroj estas libere elŝuteblaj en kvar diversaj formoj de la retejo: PDF, ePub, mobi kaj mobi-Kindle!





Ĉeĥio: Starto *www.esperanto.cz/cs/starto*

Starto estas Esperanto-gazeto kaj organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA), fondita en 1968. En la revuo aperas informoj kaj impresoj pri Esperanto-asocioj, anoncoj kaj kalendaro pri Esperanto-aranĝoj. Aperas kelkfoje poemoj. La diversaj kluboj en Ĉeĥio havas dediĉitan parton en la revuo por raporti pri siaj agadoj. Ekde la jaro 2000 eblas legi la gazeton ankaŭ en bitformo. Ĉiuj eldonoj ekde la jaro 1986 estas haveblaj en la arkivo. Novajn numerojn vi trovos en la retejo de ĈEA.

Ĉeĥio: Bulteno de la E-klubo en Prago
www.mallonge.net/pragabulteno

La praga klubo eldonas ĉiujare tri numerojn de sia revuo Bulteno. Ĝin redaktas Tomáš Břicháček. Ekde 2014, la praga klubo disponebligas ĝin ankaŭ ciferece.

Ĉeĥio: Dio Benu *www.mallonge.net/diobenu*

Gazeto de la Ĉeĥa sekcio de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Ĝi aperas 4-foje jare ekde 1991 kun ĉirkaŭ 28 paĝoj en formato A5. La gazeto estas legebla ankaŭ rete. Fondinto kaj daŭra redaktoro de la gazeto estas Miloslav Šváček. La arkivo de jarkolektoj 1991-2018 aperas en la retejo.


STARTO

N-ro 3/2017 (264)

ORGANO DE ČEĤA ESPERANTO-ASOCIO

foto Matěj Nárožný

Seminarianoj en la pola Duszniki vizitis grupe nian muzeon


Bulteno

de Esperantista Kluboen Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze N-ro 1/2020 (218) 22. 4. 2020

Koronvirusa pandemio ne haltigis nin

Koronvirusa pandemio, maskoj, spirproblemoj, kvarantenoj ... Ni kolektu esprimojn rilataj al la nuna situacio.

Filmy z pražského klubu esperantistů

Esperanto.cz

La koronvirusa pandemio en printempo 2020 forte trafis nian landon kaj ankaŭ nian movadon. Agado de pragaj esperantistoj estas limigita. Ne povas okazi kunvenoj, nek kunaj amasaranĝoj. Ni ĉiuj fermiĝis en nia hejmoj kaj nian vizaĝoj kaŝiĝis malantaŭ maskoj. Tamen la esperantista vivo ne haltigis. Ni restas en kontakto kaj ni laboras kaj amuzigas kune. Estiĝis kelkaj gravaj akiroj. Tiu ĉi Bulteno enhavas tiujn el ili kaj raportas pri la aliaj.

EL LA ENHAVO

Aktualajoj 2
Novajoj de KAVA-PECH 3
Renemove al Stanjo 5
Koronvirusa pandemio 6
Vidvino en reĝimo de sekretigo 9
El korespondajo de B. Němcová ... 20
Je jaro / Estas printempo 23

O časopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jiráskova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petrik

Danio: Esperanto en Danio *www.mallonge.net/danio*

Dana Esperanto-Asocio (DEA) eldonas kvar- aŭ kvinfoje jare periodaĵon nomatan "Esperanto en Danio" (EeD). La revuo estas eldonata ekde la jaro 1994. Ĉiuj membroj de Dana Esperanto-Asocio ricevas "Esperanto en Danio" perpoŝte. Ĉiuj aliaj interesitoj (kaj kompreneble ankaŭ membroj) povas senpage legi ilin interrete en ĉi tiu paĝo. La redaktoro estas Jens S. Larsen.

Danio: Dana Fervojisto *www.mallonge.net/df*

Dana Fervojisto estas la organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA). Ĝi aperas dufoje jare. Redaktantoj estas Jan kaj Lene Niemann. La revuo interalie raportas pri kunvenoj de DEFA kaj pri kongresoj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.






Finnlando: Esperantolehti *www.mallonge.net/elehti*

Membrogazeto kaj organo de Esperanto-Asocio de Finnlando. La gazeto aperas 5-foje jare. Ĝi estas abonebla ankaŭ eksterlande. Ĉefredaktoro estas Robert Bogenschneider. La enpaĝigon prizorgas Maj-Lis Krouvi kaj la respondeca redaktoro estas Tuomo Grundström.

En la reta arkivo de Esperantolehti estas elŝuteblaj ĉiuj numeroj kiuj aperis inter 1997 kaj 2018 en PDF-formo.

Francio: La informilo *www.mallonge.net/li*

Dulingva informbulteno pri Esperanto de la asocio Esperanto France-Est en orienta Francio. Ĝi aperas 4-foje jare. Redaktas ĝin André Grossmann. Abono al la reta versio kostas 7,5 EUR jare. Precipe aperas en la gazeto raportoj de renkontiĝoj kun fotoj.





Francio: Legi - Esperanto Gironde *www.esperanto-gironde.fr/legi*

Esperanto ekzistas en Bordozo de la komenco de la 20a jarcento per la kreado, la 27an de februaro 1902, de la Esperantista Grupo de Bordozo. Ekde 1987 ĝi nomiĝas Esperanto Gironde. Ĝia membrogazeto aperas ĉiumonate, ĉiuj niaj membroj ricevas PDF-revuon. Aparte traleginda estas la jubilea numero 150.

Francio: Le monde de l'Espéranto *www.mallonge.net/lme*

Publika informa revuo ĉefe en la franca pri Esperanto kaj pri komunikaj problemoj en la mondo. Ĝi estas periodaĵo de la organizaĵo Espéranto-France, la landa asocio de UEA en Francio. La redaktan teamon kunordigas Claude Nourmont. *Le Monde de l'espéranto* estas libere traserĉebla kaj elŝutebla tuj post kiam ĝi estas publikigita. Ĝi estas ankaŭ havebla senpage papere en la ĉefsidejo de Esperanto-Francio kaj en iuj Esperanto-kluboj, iom post la apero de la bitversio.

Francio: Espéranto Provence *provenco.esperanto-france.org*

Kvaronjara dulingva gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio. Redaktoro kaj enpaĝiganto estas Pascal Vilain. La gazeto raportas interalie pri la agado de la lokaj grupoj en Provenco, publikigas paĝon por komencantoj kaj mesaĝojn de la legantoj.





Francio: La Norda Kuriero *www.mallonge.net/nk*

La Norda Kuriero estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio. Ĝi eldoniĝas kvarfoje en jaro: januare, aprile, julie kaj oktobre. Ĉefredaktas: Katja Boen kaj Xavier Dewidehem. Enpaĝigas: Xavier Dewidehem.

La Norda Gazeto aperis unuafoje en 1908 kaj estis ricevata papere de ĉiuj federacianoj kaj abonantoj en Norda Francio. Komence de 2016 oni decidis transformi la Gazeton en novan, retpoŝtan informilon: la Norda Kuriero. Ĝi aperas ĉiun duan monaton kaj celas informi pri la vivo de la Nordfrancia Federacio kaj ĝiaj kluboj. Eblas libere elŝuti ĉiujn aperintajn numerojn de la gazeto de ĝia Google Drive.

Francio: Sud-Rejna Kuriero *www.mallonge.net/srk*

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Espéranto. Ĝi aperas komence de ĉiu trimestro, raportas pri pasintaj eventoj kaj informas pri okazontaj aranĝoj en la regiono, en Francio kaj en la mondo. Kun formato A5, ĝi plej ofte ampleksas 20 aŭ 24 paĝojn. Malnovaj numeroj ekde 2011 estas elŝuteblaj senpage.

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de la bulteno. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de membro-kunveno. Sed ankaŭ eblas aboni la gazeton sen membriĝo al la asocio. Tio kostas nur 5 EUR jare.



NUMERO 14 — 20 FEB 2020

NORDA ☆ KURIERO

Bela festo de Zamenhof kun Jules Verne

Jean-Claude Roy/Zamenhof, Isabelle Vigné/Sᵐᵉ Desmaret, Claude Tillier/Jules Verne, Maryse Devis/servistino


La 15ª de decembro estas tago konata de la esperantistoj kiel naskiĝtago de Zamenhof, tiel ke tiudate esperantistoj organizas Zamenhof-festojn. Sed majstra afero estas festi tiun ĉi tagon kun Zamenhof mem! Ec kun aliaj famuloj!

Ĝuste dimanĉon la 15ᵐᵉ de decembro 2019, okaze de la federacia jarkunveno (vd. p. 2), la klubo *Esperanto 80* organizis feston, kies ĉefmomento estis la teatrumita vizito de la domo de la fama verkisto Jules Verne en Amieno... kun Zamenhof kaj Jules Verne mem!

En tiu fikcia teatrajo, Jules Verne (rolita de Claude Tillier) en sia domo akceptis Zamenhof (Jean-Claude Roy) kaj lian esperantistan tradukantinon Sᵐᵉ Desmaret (Isabelle Vigné), kaj ili paŝis tra la salonoj diskutante pri esploroj sciencaj kaj monda, pri lingvoj kaj Esperanto.

Sekvante ilin, la ĉeestantoj ĝuis la belajn meblaron kaj ornamojn, sed ankaŭ la tre brilan roladon de la tri komediantoj! Fine de la aplaŭdita vizito, la esperantistoj kaj la oficistoj de la Domo de Jules Verne trinkis kune laŭdante la partnerecon inter la Domo kaj la Amiena klubo. Jen bela sukceso esperantista!

1 / 7



Sud-Rejna Kuriero

Oktobro 2018 — Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto — N°70

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr

Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

Ĉi-tiu numero aperas iom pli malfrue, nur en oktobro. Tiel jam eblas informi vin pri nia venonta Zamenhof-festo, kiu okazos ĉi-jare en Frajburgo. Dank'al Manfred Westermayer ni jam povas prezenti al vi la programon.

Lastjunie sinsekve okazis "Komuna Manĝo" de nia grupo Mulhouse-Esperanto, "Amika Tago" en Frajburgo kaj "Verda Fadeno".

Kun bedaŭro kaj ĝagreno ni anoncis la forpason de nia samideanino Simone Kiry, kies funebran ceremonion partoprenis pluraj niaj membroj.

Certe la plej gravaj eventoj de ĉi-tiu somero ja estis la Esperanto-kongresoj, kiuj okazis en Hispanio kaj en Portugalio. Pri tiuj eventoj pluraj gazetoj aperigis raportojn, komentojn kaj fotojn.

Same ankaŭ nia regiona gazeto La informilo raportis pri ili. Tial en ĉi-tiu numero ni preferas mencii nur tute lokajn eventojn aŭ kongresajn personajn spertojn. Je tiaj okazoj Bernard akiris interesajn libroj n, pri kiuj li volonte raportas.

Krome komenciĝis niaj kursoj en Espace 110 kun novaj horaroj. Sed bedaŭrinde kelkaj antaŭaj lernantoj jam ne aliĝis al la kurso.

En Espace 110 ni dejoris okaze de malfermitaj pordoj la 3an de oktobro.

En Wesserling ĉe la libro-foiro dejoris Roberto por informi pri Esperanto.

Same estas planita dejorado ĉe la ekologia foiro en Ungersheim meze de novembro.

André Grossmann

SRK (10/2018) N° 70 paĝo 1 / 16

Germanio (kaj Aŭstrio): Esperanto aktuell *www.esperanto-aktuell.de*

Esperanto aktuell estas gazeto de la Germana Esperanto-Asocio (GEA). Jare aperas ses numeroj. Ekde 2011 la gazeton kune redaktas la baratdevena germano Yashovardhan Singh kaj la slovako Stano Marček – internacia redakcia duopo.

Esperanto aktuell aperas ankaŭ por blinduloj, danke al Uwe Stecher el Aŭstrio. Kune, la revueto de Germana Esperanto-Junularo, ekde januaro 2011 aperas kiel parto de Esperanto aktuell.


Esperanto aktuell (kun Kune) estas abonebla. Kvankam ekzistas PDF-versio ekde 2015, ne ekzistas por la bitversio de Esperanto aktuell aparta abontarifo, nek ekzistas reta arkivo kun malnovaj numeroj.

Germanio: Magdeburga folio

Neregula interreta informilo pri aktualaĵoj el la mondo esperantista. Eldonita en Magdeburg, ĉefurbo de la germana federacia lando Saksio-Anhalto nur kiel dosiero en PDF-formo.

Jam aperis 157 numeroj! Abonebla sendante retpoŝtan peton al ĝia redaktoro Dieter Dungert: Ddungert@t-online.de





Magdeburga folio

Neregula interreta informilo pri aktualaĵoj el la mondo esperantista

N-ro 157(57) **Majo-Junio 2020**

ENHAVO:

Esperantigo de "coronavirus"	2
Kie estas la Duolinganoj?	2
La pandemio kaj la homaro: konkludoj de la viruso	5
La 14-a Mediteranea Esperanto-Semajno en „Les Issambres"	9
La Ondo de Esperanto: la printempa eldono sur 122 paĝoj	10
Fratoj Grimm: Kuraĝa tajloreto	11
Ho, mia kor`, ne batu maltrankvile ...	17
KCE kaj AEI pri la kursoj en Duolingo kaj aliaj	23
Forpasis Hans Erasmus	23
Paulo Sérgio Viana: Kurba	25

Hispanio: Boletín *www.mallonge.net/boletin*

Hispana Esperanto-Federacio (HEF) publikigas propran gazeton, trimonatan, nomatan "Boletín". Malgraŭ la nomo, preskaŭ ĉiuj artikoloj, krom tiuj oficialaj, estas verkitaj en Esperanto. La revuo estis fondita en 1949, baldaŭ post la kreado de la Federacio, post la parentezo kaŭzita de la interna hispana milito, sed ĝia formo kaj enhavo evoluis dum tiuj ĉi 65 jaroj. Ĝi enhavas ĉefe novaĵojn pri la lingvo kaj la movado, sed ankaŭ beletrajn kaj disvastigajn tekstojn.

Dum la jaroj redaktis la gazeton kelkaj el la plej gravaj verkistoj el Hispanio, kiel Luis Hernández Lahuerta, Antonio Marco Botella aŭ Miguel Gutiérrez Adúriz. Nuna redaktoro estas Ángel Arquillos López. Kutime, ĉiuj numeroj de Boletín estas libere alireblaj rete, en la Bitoteko de HEF, krom la lastaj kvar numeroj.

Hispanio: La Bitbulteno *www.mallonge.net/bb*

Hispana Esperanto-Federacio komencis redakti retan bultenon, kiu estas sendata retpoŝte al ĉiuj interesitoj. La Bitbulteno ne havas striktan periodecon, sed estas sendata averaĝe unu fojon monate. Ĝi estas dulingva, hispane kaj Esperante, kaj tial povas taŭgi por simpatiantoj, por esperantistoj, kaj ankaŭ por tiuj lernantoj dezirantaj praktiki la lingvon.

Ĉiu interesito povas ĝin ricevi per retpoŝto, plenigante la formularon troviĝantan en diversaj paĝoj de tiu ĉi retejo, kaj ankaŭ skribante al la adreso letero@esperanto.es.

Ĉiuj ĝisnunaj numeroj legeblas ankaŭ en la reto. Ligiloj aperas en la retejo.




La Bitbulteno

NUMERO 66

Boletín Electrónico de la Federación Española de Esperanto.
Edición bilingüe.
Bita novaĵletero de Hispana Esperanto-Federacio. Dulingva eldono

(atentu: en iuj navigiloj la esperanta versio aperas tute je la fino, post la hispanlingva)

ENCUENTROS VIRTUALES EN ESPERANTO

Se confirma, por desgracia, la suspensión de encuentros internacionales de esperanto, debido a la crisis del coronavirus. La Asociación Internacional de Esperanto, UEA, ha confirmado que este año no tendrá lugar el Congreso Universal de Esperanto, que estaba previsto para el mes de agosto en Montreal (Canadá). Esta sede se aplaza para el año 2022, mientras que el congreso de 2021 se mantiene, como estaba previsto, en Belfast (Irlanda del Norte). Sin embargo, UEA ha anunciado la organización de un encuentro virtual en agosto de este año, con actividades similares a la del Congreso, lógicamente adaptados a las circunstancias, con un festival ya desde el mes de julio. Algunas de las previsiones pueden leerse aquí.

VIRTUALAJ RENKONTIĜOJ EN ESPERANTO

Konfirmiĝas bedaŭrinde la prokrasto aŭ nuligo de internaciaj renkontiĝoj de Esperanto, pro la krizo kaŭzata de la kronviruso en la tuta mondo. Universala Esperanto-Asocio konfirmis ke ĉijare ne okazos la Universala kongreso de Esperanto, antaŭvidita por la monato aŭgusto en Montrealo (Kanado). La kongreso en tiu sidejo estos prokrastita por 2022, dum la UK de la jaro 2021 plu okazos en Belfasto (Nordirlando) Tamen, UEA anoncis la okazigon de virtuala anstataŭa renkonto en aŭgusto ĉijara, kun aktivaĵoj similaj al tiuj de la UK, sed logike adaptitaj al la cirkonstancoj, kaj kun festivalo jam en julio. Pri tiuj planoj vi povas legi en tiu ĉi oficiala komuniko de UEA.

Pli proksima estos la Malferma Tago de UEA, kiu tradicie disvolviĝas ĉiun duonjaron en la centra oficejo de

Hispanio: Heleco *www.mallonge.net/heleco*


Heleco estas la pres-organo de la Astura Esperanto-Asocio (AEA), esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la Internacia Lingvo unualoke en la urbo Gijón. Ĝi aperas malregule. La lasta numero (94) aperis en septembro 2018.

Hispanio: Kajeroj el la Sudo *www.mallonge.net/kajeroj*

Kajeroj el la Sudo estas Esperanta gazeto, aganta kiel bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj (HALE). Ĝia enhavo estas ĝenerala, ne nur ligita al la laborista Esperanto-movado. En la lastaj jaroj ĝi fariĝis sufiĉe polemika, ĉar parto de la unuaj membroj de HALE konsideris ke ĝia politika tendenco ne respegulis la ideologion de SAT, malgraŭ la rilato de HALE al tiu organizo.

Ĉiuj aperintaj numeroj de Kajeroj el la Sudo troviĝas enretigitaj en la Gazetoteko Lanti.





Hispanio: Kataluna Esperantisto *www.mallonge.net/kataluna*

Oficiala organo unue de Kataluna Esperantista Federacio kaj nuntempe de Kataluna Esperanto-Asocio. Plej multaj tekstoj aperas unulingve en la kataluna kun resumoj en Esperanto kaj aliaj lingvoj. La revuo aperas jam de 1910! Ĝi aperas nuntempe jare. Redaktas: Ferriol Macip i Bonet, Ramon Perera i Perera, Ramon Rius kaj Víctor Solé.

Italio: Itala Fervojisto *www.mallonge.net/if*

Informa Bulteno de la Itala Fervojista Esperanto Asocio (IFEA), landa asocio de IFEF. Dulingva redakto (itale-esperante). Redaktas ĝin Romano Bolognesi kaj Vito Tornillo. La revuo interalie raportas pri kunvenoj de IFEA kaj pri kongresoj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Aperas en ĝi ankaŭ artikoloj pri trajnoj, fervojaj linioj, pri teknikaĵoj ktp. Vi povas libere elŝuti la gazeton de la bitoteko de la Itala Esperanto-Federacio.





Italio: Katolika Sento *www.mallonge.net/ks*

La Itala Katolika Esperantista Unuiĝo (UECI) estas la itala sekcio de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), internacia privata asocio de fedeluloj laŭ pontifika juro rekonata de la Papa Konsilio de la Laikoj. Katolika Sento estas ĝia dumonata revuo. Ĝia respondeca direktoro estas Mons. Gianni Ambrosio. La revuo ekzistas ekde la jaro 1921. Jarkolektoj estas haveblaj en la retejo ekde la jaro 1985.

Italio: TEA-bulteno *www.mallonge.net/tea*

Kelkpaĝa bulteno de Triesta Esperanto-Asocio. Redaktanto: Elda Doerfler. Fondita en 1997. Dumonata.



KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI) www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 - Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli - Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62 - stampato da ditarte.net - Grignasco di Zocco (VC)

Anno 98 - n. 1
GENNAIO - FEBBRAIO 2019

52ª Monda Tago de la PACO
1a de Januaro 2019

La buona politica è al servizio della pace

La bona politiko estas je servo de la paco

Il messaggio di quest'anno di Papa Francesco è datato: Vaticano, 8 dicembre 2018.

La ĉijara mesaĝo de Papo Francisko estas datita: Vatikano, San de Decembro 2018.

Econe un breve riassunto:

Jen ĝia mallonga resumo:

1. "Pace a questa casa!"

Gesù disse ai suoi discepoli mandati in missione: «In qualunque casa entriate dite: "Pace a questa casa!"». Questa "casa" è ogni famiglia, comunità, paese, continente; è ogni persona, senza distinzioni; è la nostra "casa comune"; il pianeta su cui Dio ci ha posto.

2. La sfida della buona politica

La ricerca del potere ad ogni costo porta ad abusi e ingiustizie. Quando non è vissuta come servizio alla collettività umana, la politica può diventare strumento di oppressione, di emarginazione e persino di distruzione. Se invece è attuata nel rispetto della vita, della libertà e della dignità delle persone, può divenire una forma eminente di carità.

3. Carità e virtù umane per una politica al servizio dei diritti umani e della pace

La buona politica a servizio della pace rispetta e promuove i diritti umani fondamentali e tesse

Da un disegno di Gemma Aroxio per Katolika Sento

1. "Paco al ĉi tiu domo!"


Jesuo diris al siaj disĉipluj senditaj en misio: «En iun ajn domon vi eniros, diru: "Paco al ĉi tiu domo!"». Ĉi tiu "domo" estas ĉiu familio, komunumo, lando, kontinento; ĝi estas ĉiu homo, sendistinge; estas nia "komuna domo": la planedo en kiu Dio loĝigis nin.

2. La defio de la bona politiko

La celado al la povo ĉiukoste alportas misuzojn kaj maljustaĵojn. La politiko, ne praktikata kiel servado al la homa komunumo, povas fariĝi ilo de subpremado, de ekskludo kaj eĉ de detruo. Se, kontraŭe, ĝi estas praktikata respektante la vivon, la libertecon kaj la dignon de la personoj, ĝi povas fariĝi elstara formo de karitato.

3. Karitato kaj homaj virtoj por politiko je la servo de la homaj rajtoj kaj de la paco.

La bona politiko je la servo de la paco respektas kaj subtenas la fundamentajn homajn raj-



TEA-BULTENO

22ª JARO · N°151 MARTO · APRILO N. 3-4/2020

Paradigmo de stulteco – Mono transformas fidelecon en malfidelecon, amon en malamon, virtan en malvirtan, malsaĝecon en virtoz, servistaĵon en mastron, mastron en servistaĵon, malsaĝecon en inteligentecon, inteligenton en malsaĝecon.
Karl Marx, germana historiisto kaj filozofo (1818 - 1883)

Jara Ĝenerala Asembleo - Trieste, 23 februaro 2020
Raporto pri la agado en 2019

MORALA RAPORTO DE LA PREZIDANTO

Estimataj Asocianoj, karaj Geamikoj! Bonan tagon kaj bonvenon al tiu ĉi tradicia rendevuo dum kiu ni resumos la laŭtagojn kaj klopodos kunmeti plurajn agadojn por daŭrigi en nia laboro favore al Esperanto kaj nia asocio.

Estas aparta plezuro saluti kaj bonvenigi Martin Stupp-nig-n, nian Honoran membron, kiu ekde la pasinta jaro finfine denove sukcesas partopreni en tiu ĝi nia grava asembleo. Kaj pro tio mi dankas la Fervojan Entreprenon, kiu restarigis la trajnon kunligon inter Aŭstrio kaj Trieste. Tiu ĉi fakto ion signifas: ke ni persone fartas sufiĉe bone, ke nia grupo vivas, ke ni ankoraŭ sukcesas pagi la ekspezojn por tiu ĉi sidejo.

Ankaŭ ĉi-jare mi devas atentigi vin ĉiujn pri nia ne tro facila situacio. TEA, malgraŭ siaj 114 jaroj, povas ankoraŭ sukcese labori por Esperanto en Trieste kaj en nia Regiono: pluraj faktoj tion pruvas. Mi citu la demandon pri ebla kurso en Gemona *del Friuli*; interesiĝo pri nia lingvo en Palmanova fare de iu interesa koruso preta kanti ankaŭ en la internacia lingvo; ebla revivigo de esperanto-agado en Gorizio danke al Alberto Muzzu, kiu pretus ankaŭ ĉi-printempe gvidi kurson, al la ekspozicio pri Zamenhof ĉe la tiea Sinagogo, kaj precipe pri lerneja projekto de Lingvistika Liceo kiu – sendepende de ni – danke al "Erasmus-porjunularaj projektoj" sendos studentan grupeton al Bialistoko kie ĝi estos envolvita en programo pri Esperanto.

Do... kial nia situacio ne estas facila? La respondon vi jam konas: ni estas ĉiam pli malmultnombraj kaj mankas al ni la necesaj novaj membroj por aktive kaj laboreme plusporti la torĉon de Esperanto en nia Regiono.

Tamen... ni estas esperantistoj, ĉu ne? Ni profesie «esperas», malgraŭ ke la vivo fariĝis ĉiam pli komplika, malfacila, kaj kunmeti fruktodonajn agadojn postulas ne nur konstantan laboron sed ankaŭ financaĵn rimedojn. Malgraŭ ĉio ni estas kontentaj, ĉar inter ni trovigas kelkaj junaj membroj kun granda entuziasmo, kiels nomojn ankaŭ ĉi-jare mi volas citi: Peter Gržec, Mirko Nikodimovich kaj Giampaolo Tomasi. Novaj fortoj, novaj esperoj, novaj labormetodoj, espereble, sukcesos pluvivigi nian asocion kaj permesi ĝian kreskon.

Printempe 2018, la Itala Esperanto-Federacio proponis al ni organizi en Trieste la 86ª Italian Kongreson de Esperanto dum la lasta semajno de aŭgusto. Ni akceptis. Ni laboregis dum la restanta parto de 2018, laboregis multe pli en la luta 2019ª jaro kaj eĉ komence de 2020. Ni laboris sukcese, malgraŭ ĝeo: maj gastoj estos tre kontentaj pri la organizo, pri la programo, pri la kongresa etoso vere internacia, pri la urbo. Kaj ĉi-rilate mi volas logi lektoreton skribitan de kongresano al nia taga ĵurnalo *Il Piccolo*.

ESPERANTISTA TRIESTO

Elde sabato mi vivas mirindan aventuron: mi pasigis mementojn kaj horojn kune kun personoj alvenintaj el la tuta mondo (krom Oceanio), sub la signo de dialogo kaj interlanĝo de informoj, opinioj kaj emocioj. Mi dankas pro tio Trieston, kiu almenaŭ al mi montris sincerajn bonvenigon kaj senperan, vastkoran ĝojn vreteo. La esperantistaj geamikoj prvenos bejnen kun granda sereneco en la loco. Dankon!

Ivan Orsini/Bologna


Supozeble tiu ĉi kongreso estos la lasta "granda" aranĝo organizita de nia Asocio. Por mi persone tutcerte. Mi ne diras, ke TEA nenion en-

Kroatio: Tempo *www.mallonge.net/tempo*

Tempo estas la oficiala gazeto de Kroata Esperanto-Ligo (KEL). Ĝi aperas 3-5 fojojn jare ekde 1980. Ĝin redaktas ekde 1996 ĉefe Spomenka Štimec. Per sia 130-a numero Tempo plue aperados nur kiel reta gazeto. Ĝi aperas sone sur kompaktdisko ĉe Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj. Voĉlegas Spomenka Štimec kaj Neven Kovačić. Ĉiuj numerojn de Tempo estas libere disponeblaj en la retejo de Kroata Esperanto-Ligo.

Litovio: Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj *www.mallonge.net/abelo*

La fama renkontiĝo Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) ĉiun trian jaron okazas en Litovio. Tiam aperas informilo kiu estas papere disdonata al partoprenantoj, sed ankaŭ alirebla rete. En 2019, kiam BET okazis en Panevėžys, ĝi nomiĝis "Abelo" kaj ĝin redaktis Stano Marček.



tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

novembro 2019 / n-ro 134

Granda 110a jubileo de Esperanto en Bjelovar festita en septembro

Malfermita la nova konstruajo de Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac

Turisma agado ekfunkciis en nia ejo en Vodnikova 9

Kroataj esperantistoj aktivis en Hispanio, Slovakio, Finnlando kaj Italio



Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Panevėžys, Litovio

Abelo

Sabato, la 6-a de julio 2019

N-ro 1

Salutmesaĝo de Vytenis Povilas Andriukaitis, Membro de Eŭropa Komisiono

Karaj gesamideanoj,

Mi estas granda amanto de Esperanto, ĝia fano, admiranto, amiko, propagandisto kaj subtenanto. Kaj ne nur. Mi komprenas historian kaj kulturan sencon, konserviĝeman valoron de ĉi tiu ekskluziva lingvo. Havante precipajn ligojn kun Litovio, ĝi estas ankoraŭ pli proksima por ni. Dum soveta tempo Esperanto ja estis formo de protesto kontraŭ dominado de altrudata rusa lingvo. Pro tio ankaŭ mi, aktive partoprenante en rezista movado, ĉirkaŭ la jaro 1975 proponis paroli ne ruslingve, sed Esperante, ĉar tiu lingvo simbolis humanecon kaj demokration. Esperanton mi ellernis en junaĝo, inspirita de ĝia fundamenta ideo – strebado al idealo de paca mondo, en kiu regus egalaj rajtoj kaj justeco.

Dum tempofluo Esperanto iĝis ponto inter homoj kaj popoloj, kaj tiu ponto helpas ekkoni diversecon de kulturoj. Baltiaj Esperanto-Tagoj jam fariĝis tutelropa aranĝo kun multjara tradicio – kaj la 55-aj tion pruvas – ĝi kunvenigis amason da partoprenantoj el pli ol 30 landoj, diferencaj per siaj lingvoj, kulturoj, tradicioj. Tio ankoraŭfoje pruvas, kiom multe da komunaĵoj ni kunhavas: deziron ekkoni unuj la aliajn, komunikiĝi kaj kunlabori. Nin unuigas la lingvo, detruanta murojn kaj vaste malfermanta pordon al la mondo.

Mi salutas la organizantojn kaj partoprenantojn de la aranĝo, kiu gravas por Litovio ankaŭ por la tuta Eŭropo. Mi deziras al ĉiuj interesaĵn diskutojn, produktivan etoson kaj longedaŭrajn impresojn de restado en Litovio.

Mi esperas, ke ĉio tio instigos vin ankoraŭ iam reveni en Litovion.

Programo

La 5-a de julio (vendredo)

10.00 – 22.00 Registrado de la partoprenantoj, loĝigo, informoj (en universitata konstruaĵo, Nemuno str. 33)

La 6-a de julio (sabato)

09.00 – 22.00 Registrado de la partoprenantoj, loĝigo, informoj (samloke)

13.00 – 14.00 Tagmanĝo (memstare)

18.00 – 19.00 Vespermanĝo (memstare)

19.30 – 20.00 Komuna organiza kunveno de BET-anoj (Ĉefsalono)

20.00 – 21.00 Koncerto ne Natalia Bertse kaj kantado de la Nacia Glorkanto (Ĉefsalono)

La 7-a de julio (dimanĉo)

07.00 – 08.00 Matenmanĝo – la unua alterno. En la kafejo de la scienca kaj teknologia parko, J. Žemgulio str. 46.

08.00 – 09.00 Matenmanĝo – la dua alterno. En kafejo de scienca kaj teknologia parko, J. Žemgulio str. 46.

09.00 – 10.00 **Organizaj kunvenoj** de gvidantoj kaj vizitantoj de ĉiuniveleaj Esperanto-kursoj, gvidantoj kaj prelegantoj de Somera Universitato, gvidantoj kaj prelegantoj de SUS-36 de AIS, gvidantoj kaj vizitantoj de aliaj konstantaj programeroj (Ĉefsalono)

10.00 – 11.00 **Malfermo de Somera Universitato.** La unua prelego el la prelegociklo de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (ĉambro 117).

10.00 – 11.00 **Inaŭguro de SUS-36 de AIS.** La unua prelego de prof. Amri Wandel el la triprelega kurso „Spacteleskopoj: de Hubble ĝis James Webb" (ĉambro 204).

10.00 – 11.00 **Prelegserio de d-ro Gábor Márkus** "Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?": la unua prelego "De animala ekzisto ĝis diiĝo" (ĉambro 118).

Nederlando: Fenikso *www.mallonge.net/fenikso*

Fenikso estas dumonata membrogazeto de Esperanto-Nederland. Celante siajn membrojn, la gazeto raportas precipe pri Esperanto-kulturo en la lando: agadoj de la asocio, invitoj al aŭ raportaĵoj pri Esperanto-aranĝoj, recenzoj de libroj kaj revuoj, ligiloj al filmetoj rete. Estas ankaŭ leterkesto kaj nekrologo.

Redakcio:

- Ĉefredaktoro: Frank van Hertrooij


- Redaktoro: Marc Konijnenberg

Kelkaj artikoloj aŭ fragmentoj estas verkitaj en la nederlanda, ofte poemoj dukolumne prezentitaj nederlande-Esperante. Aperintajn numerojn de la revuo Fenikso vi povas elŝuti de la retejo de Esperanto Nederland.

Nederlando: Pos-Amiko *www.mallonge.net/pos*

Pos-Amiko estas eldonaĵo de la Nederlanda Esperanto-Junularo. Ĝi aperas kvarfoje jare ekde 2012. La kelkpaĝa gazeto kutime enhavas varbilon por la ĉiujara renkontiĝo KKPS, novaĵoj de NEJ kaj novaĵoj de TEJO. Ĝin redaktas precipe Rogier Huurman.





Pos-Amiko

Printempo, numero 32

Pensu pri aliaj homoj, restu hejme kaj havigu la gazeton!

INDEKSO:

1. 2020 oficiale nuligita
1. Surpriza ĉeesto de renkontiĝoj
2. Civito fermas limojn
2. CO pligrandigas homforton
3. Akademio esploras vakcinon
3. Estraranoj timas elĉerpiĝon
4. Formortiĝo de speciojn
4. NEJ-Novaĵoj
5. Horoskopo
5. Kara Koko
6. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.
Redaktoro: Koko Poso
kkps.klackunveno@gmail.com
http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko

Anonco de la redaktoro

Jen la unua Pos-Amiko, kiu ne aperas sur papero en Esperanto-renkontiĝo. Ne ĉar mankas papero, sed mankas renkontiĝoj. Por bone amuziĝi dum tiuj ĉi kvarantenaj tempoj tiu ĉi gazeto havas du aldonajn paĝojn!

2020 oficiale nuligita

La Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj decidis je granda plejmulto nuligi la nunan jaron 2020. La vortumo de la propono asertas, ke post malbona komenco de la jaro kaj poste diversaj krizoj rilate al la kronvirusa pandemio jam ne indas daŭrigi la jaron. La Ĝenerala Sekretario klarigis, ke ĝisnunaj rezultoj ne plu validos. Li esperas lanĉi 2021 jam post kelkaj semajnoj kaj pardonpetas pro la kaŭzita ĝeno.

(La asembleo okazis rete)

Surpriza kresko en ĉeesto de renkontiĝoj

Deviga izolado en multaj landoj nuligis multajn renkontiĝojn, inter ili ankaŭ Esperanto-renkontiĝojn. Sed la movado jam havas

Nederlando: La Verda Stelo *www.tinyurl.com/laverdastelo*

La kluba gazeto de Esperanto Noord-Nederland nomiĝas La Verda Stelo. Ĝi aperas malregule. La redakcion konsistigas Richard Hofman kaj Ineke Emmelkamp.


Slovakio: Esperantisto Slovaka *www.mallonge.net/slovaka*


Esperanta gazeto fondita en 1946 aperanta en Slovakio nun kiel organo de Slovakia Esperanta Federacio. Ĝi estas eldonata ĉiun trian monaton, do kvarfoje en jaro kun subtitolo "Socia kaj kultura revuo de esperantistoj en Slovakio".

Membroj de la Slovakia Esperanta Federacio ricevas la bitversion senpage. Abonkotizo por la bitversio de (sen membreco en SKEF): min. 4 EUR. Validas kaj por eksterlandanoj, kaj por slovakoj.

Slovenio: Informoj *www.mallonge.net/inf*

Bulteno "Informacije/Informoj" publikigas kontribuaĵon en la slovena lingvo kaj en Esperanto. Ĝin redaktas Ostoj Kristan. Provlegas Tomaž Longyka.




ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE — SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

INFORMACIJE — **INFORMOJ**

Leto / jaro 25, št. / n-ro 1 — februar / februaro 2020

Uvodnik | Frontartikolo

Estas tempo de jarkunvenoj. La jarkunvenoj gravas. Ene de la Esperanto-societoj, oni resumas la rezultojn de la estinta jaro kaj starigas celojn kaj planojn en la formo de programoj kaj projektoj. Ni bezonas helpon kaj kunlaboron de novaj kaj de la eksaj geanoj. Venu kaj kunagu!

V februarju in marcu se bodo zvrstili letni zbori naših organizacij. Ti občni zbori niso le administrativna navlaka, so tudi priložnost, ko povzamemo dosežke preteklega obdobja in formaliziramo načrte za prihodnost v obliki programov in projektov. Vtis je, da delamo kar dobro in smo opazni v družbenem okolju. Pridobili smo tudi nekaj novih članov, a je stopnja staranja in odhajanja vseeno večja od pomladitve. Pritegniti je treba zlasti izkušene esperantiste, ki so se nekoliko odmaknili od našega gibanja. Pomembno je, da vsi prispevamo k temu procesu s svojo udeležbo, še bolje z izpovedanim stališčem ali kakšno idejo. Dragi somišleniki, potrebujemo vaš odziv in vaš prispevek, da lahko vztrajamo in omogočimo željeno raven delovanja našega gibanja. Zato ne izpustite občnih zborov kot nekaj nenujnega. Pridite in sodelujte! Ob tej priliki se vodstvo ZES zahvaljuje vsem, ki so podprli našo dejavnost z denarnimi prispevki, z delom, z materialnimi vložki in uslugami. **IO ZES**

Iz dejavnosti ZES | El la agado de SIEL

ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE • SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

Vabilo na skupščino ZES

Sklicujem redno letno Skupščino Združenja za esperanto Slovenije, ki bo

v soboto, 21. marca 2020, ob 10.00 v Ljubljani

v sejni sobi MOL – Oddelka za lokalno samoupravo, Štefanova 11.

Dnevni red:

1. Ugotovitev sklepčnosti
2. Sprejetje novega kolektivnega člana ZES
3. Izvolitev organov skupščine (delovnega predsedstva, zapisnikarja in dveh overiteljev zapisnika)
4. Poročilo o delu, finančno poročilo, poročilo Nadzornega odbora, razprava o poročilih
5. Razrešnica dosedanjim organom in izvolitev organov ZES za naslednje dvoletno obdobje
6. Program dela in finančni načrt za leto 2020 (predstavitev, razprava in sprejetje)
7. Razno

Prosim, da se skupščine zanesljivo udeležite. Če ob napovedanem času skupščina ne bo sklepčna, ker ne bo prisotna najmanj polovica članov, bo seja čez pol ure v istem prostoru. Takrat bo skupščina sklepčna, če bo navzočih najmanj 10 članov.

Poročilo o delu in finančno poročilo sta v prilogi, prav tako predlog Programa dela ter finančnega načrta za 2020. Ostalo gradivo boste prejeli na skupščini. Po uradnem delu bo v istem prostoru družabno srečanje. Pred začetkom skupščine in po njej boste lahko plačali članarino in kupili knjige.

Lep pozdrav in na svidenje!

Predsednik ZES
mag. Janez Jug l.r.

Zamenhofov dan 2019

Osrednja proslava ob 160. obletnici rojstva tvorca esperanta L. L. Zamenhofa, Dneva esperantske knjige in Svetovnega dneva človekovih pravic je bila v Slovenj Gradcu 14. decembra v organizaciji esperantske sekcije pri Kulturnem društvu Slovenj Gradec in Združenja za esperanto Slovenije. Dogodek je potekal v prostorih Knjižnice Ksaverja Meška, Ronkova 4. Zbralo se je preko 40 esperantistov in prijateljev esperanta iz vse Slovenije, tako da je bila dvorana prijetno polna. Bogat in raznovrsten program proslave je povezovala predstavnica slovenjegraških esperantistov Ivica Hace. Za prijetno popestritev med posameznimi točkami programa je vokalno-instrumentalna skupina *Hedera vento* (*Brišjanov veter*) izvedla več pesmi, nekatere v esperantu.

Svedio: Ora Ĵurnalo *www.esperanto-gbg.org*

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum (Göteborg). La eldonfrekvenco estas neregula. Redaktantoj: Siv Burell kaj Ingegerd Granat. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström.

Svislando: Sud-Rejna Kuriero Vidu: Francio

Svislando: SES informas *www.mallonge.net/si*

La bulteno "SES informas" (Svisa Esperanto-Societo informas) estas la oficiala interna informilo de Svisa Esperanto-Societo. Ĝi aperas komplete kaj nur en Esperanto dufoje jare fine de januaro kaj fine de junio. Je bezono aperas aldonaj numeroj en aprilo kaj septembro kune kun Svisa Espero. La bultenon "SES informas" ricevas la membroj de SES kaj abonantaj en papera formo. La revuo teorie ankaŭ legeblas rete, sed la plej aktuala numero kiu aperas en la reta arkivo datas de 2013.


Ora Ĵurnalo

Numero 29, Majo 2020

Iam la stacidomo de la fervojo "Bergslagsbanan" Göteborg – Kil.

Al la tuta mondo:
Bonvenon al la verda Gotenburgo!

Bonvolu viziti nian retpaĝon:
www.esperanto-gbg.org


Svisa Esperanto-Societo

informas

SES informas *n-ro 1, aprilo 2019*

Svisaj Esperanto-Tagoj
4-an kaj 5-an de majo 2019
en Belinzono, Tičino

Ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo
5-an de majo 2018, 14h00 Casa de Popolo, Belinzono

Programo

Sabaton, 4-an de majo 2018

09h-13h00
Vizitado de la merkato de Belinzono
Ĉiun sabaton okazas matene en la urbocentro de Belinzono la fama loka merkato. Ni rekomendas al tiuj, kiuj jam alvenas vendrevespere aŭ matene, viziti tiun merkaton proprainiciate.

13h00-14h00
Komuna tagmanĝo en la restoriacio Casa del Popolo (Viale Stazione 31) [aliĝo ne necesas]

14h00-16h00
Ĉiceronado kun d-ro Tazio Carlevaro tra la historia urbo de Belinzono. Tazio Carlevaro estas sperta ĉiceruno kaj altnivela esperantisto kaj ĝoje prezentas al vi sian hejmurbon kaj ties riĉan historion.

18h00-20h00
Vespermanĝo en Casa del Popolo (bonvolu aliĝi, por rezervi lokon).

20h00-22h00
Vitra salono en Casa del Popolo: Prelego de Mirejo Grosjean pri "bano, duŝo, vestolavado kaj necesejoj tra la mondo» kun multaj fotoj.

(Por la Svisa Esperanto-ĥoruso sabatvespere ek de la 18h00 estas rezervita la salono 2 por ekzercado.)

Foto: Casa del Popolo, Belinzono

(Daŭrigo sur paĝo 2)

Svislando: Svisa Espero *www.esperanto.ch/svisa-espero*

Svisa Espero estas revuo pri la temoj daŭripovo, komunikado, lingvoinstruado, daŭripova turismo, estontecoprojektoj kaj popola interkompreniĝo. Ĝi aperas 2-foje jare kun eldonkvanto de 5000 ekzempleroj, formato A4, 64 paĝoj.

Ĉiuj artikoloj de la revuo ekde ĝia kvina eldono aperas komplete kvarlingve, do Esperante, germane, france kaj itale, kaj ĉiu lingvo ricevis en la revuo sian propran koloron. Redaktas ĝin Dietrich Michael Weidmann.

Ukrainio: Ukraina Stelo *www.mallonge.net/us*

Gazeto de ukrainaj esperantistoj fondita de Oresto Kuzma en 1913. Aperas kvaronjare. Redaktoro: Volodimir Pacjurko. Arta redaktoro: Niko Voloŝin. Ne ekzistas reta arkivo, sed vi povas elŝuti kelkajn ekzemplerojn de la PDF-/ePUB-Librejo en Facebook.





Ĉio estas trovebla en interreto! Sed... multaj retejoj prezentas malaktualajn informojn kaj ne plu uzeblajn versiojn de programoj. Trovi la indaĵojn estas temporabe kaj foje iom komplike.

Dum prelegserio pri komputilaĵoj kaj retaj projektoj en lokaj kluboj en Benelukso mi rimarkis ke tre mankas superrigardo de tiaj indaj (kaj aktivaj) projektoj. Post prezento mi foje per retpoŝto sendis la plej interesajn ligilojn al ĉeestintoj, sed tio klare ne sufiĉas. Papera verko kun tekstaj klarigoj daŭre plej taŭgas por tiu celo. Do mi ek-kreis tion.

Ĉi tiu dua volumo de *Eksterrete* donas superrigardon de kaj klarigojn pri indaj kaj ĝisdataj projektoj rilate bitlibroj kaj bitgazetoj.

www.komputeko.net/eksterrete

LiberaPay

La fonduso Instigo-Liberapay, sub la aŭspicio de UEA, subtenas Esperanto-agadojn, kiuj celas provizi retajn servojn en Esperanto. Kiel komisiito de UEA pri reta agado, mi gvidas la laborojn.

Mi invitas vin subteni la kreadon, eldonadon kaj disvastigon de Eksterrete-libretoj per donaco al Instigo-Liberapay.

https://eo.liberapay.com/instigo